

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

12-a jaro

Num. 12 (134)
Decembro 1948

CENTRA OFICEJO
de la
**UNIVERSALA
LIGO**

Riouwstraat 172
DEN HAAG
Nederland
Postkonto 4088
Tel. 556677

LA POPOLOJ PAROLU!

La „Usborne-plano” por elekto de mondparlamento en 1950.

Ne nur la mondfederalistoj estas konvinkitaj, ke la mondsituacio nuntempe estas unu el la plej danĝeraj el la tuta homa historio, sed ĉiu pensanta homo, konsciiga, ke ni staras antaŭ du alternativoj: *mondunueco aŭ pereol* Ĉiu homo kun nur iom da socia sento havas la taskon kun ĉiuj siaj fortoj kunlabori por eviti novan katastrofon.

Prave! — vi diros, — sed kion povos fari ni, simplaj homoj? Jen la respondo: La energia brita parlamentano *Henry C. Usborne* iniciatis konkretan, efektivegblan planon, en kies realigo ni ĉiuj povos kunlabori. Lia propono estas organizi en la somero de la jaro 1950 en kiu eble plej multaj landoj popolvoĉdonadon por elektado rajtos elekti po unu kandidaton por ĉiu miliono de sia enloĝantaro. En la aŭtuno de la sama jaro tiu mondparlamento kunvenos en Ĝenevo aŭ alia urbo por ellabori la mondkonstitucion. Poste tiun mondkonstitucion devos ratifi la registaroj de la apartaj landoj. Kompreneble tiu kampanjo (la britoj parolas pri kru-



Henry C. Usborne,
membro de la brita parlamento.

militiro) postulas grandegan preparadon. La elektoj ne estos oficialaj, tiel ke en ĉiu lando, kie tio estos ebla, aro de volontuloj devos helpi en la organizado. Sekve ankaŭ la elektita parlamento ne estos oficiala, sed ĝiaj membroj ricevos la saman honoraron, kiel la membroj de la oficialaj parlamentoj. Ju pli da oficialaj parlamentanoj estos elektataj en la novan mondparlamenton, des pli facile la registaroj ratifos la mondkonstitucion.

Estas memkompreneble, ke la formado de mondregistaro ne povos prokrastiĝi: ĉis kiam ĉiu lando en la mondo estos ratiinta la mondkonstitucion, do en atendo ke en la mondkonstitucio estos primata ankaŭ tio, ke oni fermos la mondregistaron, se la duono de la nacioj de la mondo aŭ la nacioj kiuj reprezentas la duonon de la mondpopolo, estos ratiinta la konstitucion.

Eble la legantoj diros: fabela plano! Ĉi estas fabela plano, sed realigebla kaj neceso por malebligi novan militon. Kion alportus tria mondmilito, estas super ĉiu imagol Kaj eĉ se ĝi ne efektiviĝos, la

Praktiko

LA GAZETO DE LA MONDPOPOL

Aperas monate. — Abonprezo: 12 jaro: 24.— Steloj (6.— ned. guld.). — Al la Abonantoj de la Universala Ligo senpaga. — Reklam-tarifoj: 1 paĝo 160.—, 1/2 paĝo 90.—, 1/3 paĝo 50.—, 1/4 paĝo 30.—, 1/5 paĝo 20.—. — Kopirajto de la enhavo rezervita. — Postkonto de la Universala Ligo: 4088.

supre skizitaj linioj, tamen la preparo kaj ellaboro de ĉi tiu grandioza plano vekos la publikan opinionon. Ne estas plu tempo por diskutoj. Nun agoj devas veni, agoj, al kiuj la plej simpla homo povos kunlabori. Neniu plu havos la ekskuzon, ke li ne scias kion fari. Sur ĉies ŝultroj kuŝas granda respondeco! Ni transprenu la vortojn de *George Washington*, kiujn li eldiris en la jaro 1787 en la kunveno de Philadelphia, kiam la interbatalantaj suverenaj ŝtatoj de Nord-Ameriko staris antaŭ preskaŭ la sama dilemo, antaŭ kiu nun staras la tuta mondo:

„Versajne neniu plano, kiun ni proponas, estos akceptata. Eble ni devos travivi novan, teruran konflikton. Sed se ni, por plaĉi al la homoj, farus proponon, kiun ni mem malaprobas, kiel ni devos poste defendi nian laboron? Ni starigu standardon, sub kiu povos kolektigi la saĝaj kaj prudentaj homoj. La rezultato estas en la manoj de Dio.”

Julia Isbrucker.

„Ĝis kiam ni ne povos forlasi la perforton por solvi konfliktojn, nia ŝanco resti en vivo estos malgranda. Jura ordo en la mondo devos sekurigi la pacon.

Mondregistaro signifas ne la morton de la nacia registaro, sed ĝian renaskiĝon. Kiam estos malaperinta la neceseco de militista sindefendo, multegaj asocioj povos evolui kaj kreski kiel neniam antaŭe: laboristaj, agrikulturaj, industriaj, edukaj, sciencaj, kulturaj; ili ĉiuj floros kiel neniam antaŭe. Ĉi tie estas okazo por la plej riĉa evoluo de kultura aŭtonomio, kiam la mondo neniam vidis.”

CHARLES E. MERRIAM.



OFICIALAJ KOMUNIKOJ DE LA UNIVERSALA LIGO

162. AKTIVA KOTIZO 1949.

La Centra Oficejo de U.L. petas la Aktivajn Membrojn, ke ili bonvolu renovigi sian kotizon por la jaro 1949, sendante la pagon (24 Steloj) al la Centra Oficejo aŭ al la Landaj Reprezentantoj (ilia listo trovebla sur paĝo 153 de La Praktiko). Kvantkiam pro la ĝenerala plikariĝo la kosto de la gazeto kaj almanako grave superas la sumon de la kotizo, la Liga Estraro tamen decidis ne plialtigi la kotizon, por ke la aktiva membreco restu ebla aŭ facila por kiel eble plej multaj Liganoj. Feliĉe, la plialtigo de la kotizo povas esti evitata dank' al la tre oportuna „briko“-sistemo de nia Ligo. Efektive, pro la aliĝaj kaj aldonaj brikoj ni havas tre elastan, kvazaŭ laŭvolan kotizon. Tial la Liga Estraro kun fido apelacias je la helpemo de la membroj kaj petas, ke ili bonvolu laŭ sia povo sendi kun la nova aktiva kotizo ankaŭ kelkajn aldonajn brikojn. — La aktiva kotizo kaj la aldonaj brikoj estas kvitancataj per gumitaj marketoj, engluotaj en la membrokarton. Ili estas sendataj al la pagintoj ĝenerale en la unua Praktiko-numero aperinta post la alveno de la pago.

163. LA LIGA GAZETO.

Sub n-ro 90 kaj 120 de la Of. Kom. ni tabornas la Liganon pri tio, ke la nederlanda registaro permesita al La Praktiko por la jaro 1948 amplekson de malkaŭtume 144 paĝoj. Sed lastatempe, pro la plibonigo de la paperpozicio, oni ĉesigis la limigon, kaj tial ni povis pligi la amplekson ĝis 160 paĝoj. De nun do ne la registaro, sed nur niuj propraj membroj limigos la amplekson de nia gazeto, per sia ne sufiĉe alta nombro. Rezultu nian ideidon: doni ĉiunonate unu 24-paĝan numeron, ni povos nur tiam, kiam la nombro de niaj aktivaj membroj kaj abonantoj estos duobliginta. Oni varbu do energie kaj urĝe novajn membrojn kaj abonantojn. — Dum la nun finiganta jaro ni faris, malgraŭ la malfavoraj kondiĉoj, grandan progreson, ĉar ni sukcesis eldoni gazeton, kiu ĝuas nediskuteblan reputacion. Unu el la Liganoj skribis al ni: „Fine ekzistas Esperanta gazeto, kiu estas montrebila al ne-esperantistoj!” Li trafis esprimis la principon, kiun ni devas observi. La publikigo de primitiva gazeteto sur la nivelo de klubaj informiloj ja ne valorus la penon kaj koston. Nia tasko dum la

nova jaro devos esti: teni la atingitan nivelon de La Praktiko kaj zorgi pri ĝia regula kaj akurata aperado. Bestaŭteble ĝis nun la luktado kontraŭ la burokrataj komplikaĵoj, per kiuj la registaroj de niaj landoj tervere kaj sukcesplene lanigadas la internacian laboron, la manko de sufiĉaj helpantoj kaj lastatempe ankaŭ la malboniginta sanstato de la troŝarĝita sekretario-redaktoro, kaŭzis gravajn prokrastojn. Sed la situacio ĉiam pli kaj pli boniĝas kaj tial la baldaŭa kontentiga reguleco estas antaŭvidebla.

164. — LANDA REPREZENTANTO POR GREKUJO. — Liganon S-ro D-ro Anakreon STAMATIADIS, la eminenta greka Esperanto-pioniro, membro de la Esperantista Akademio, bonvolis akcepti la oficon de landa reprezentanto de U.L. por Grekuj. Lia adreso estas: Rodou 23, Athinaï 8.


165. — NOVAJ DUMVIVAJ AKTIVAJ MEMBROJ. — Post la publikigo de la tria listo sub n-ro 124 de la Of. Kom., la Centra Oficejo de U.L. registris la aliĝon de la sekvantaj novaj Dumvivaj Aktivaj Membroj: 22. S-ro T. J. GUE-RTITE en Surbiton, Anglujo. — 23. F-ino O. ROBOTHAM en Stockton-on-Tees, Anglujo. — 24. S-ro Mehmed JAKUPOVIĆ en Zemun, Jugoslavio. — 25. S-ro Branko RAJSIĆ en Zemun, Jugoslavio.

166. — ISLANDA VESPERO DE U.L. EN ROTTERDAM. — La 8-an de oktobro U.L. aranĝis en Rotterdam (Nederlando) „Islandan Vesperon” en la supra salono de Caland West, kiu interese lumbild-parolado de f-ino Marianne Vermaas, estraranino de U.L., pri „Islando, lando de granda estonteco”. La sukcesplenan kunvenon prezidis s-ino Julia Isbrucker, vicprezidantino de U.L.

167. — INTERNACIA FBRIO DE U.L. EN ANGLUJO. — La Brita Oficejo de U.L. organizas Internacian Esperantistan Ferion en la urbo Dover (Anglujo) dum kvar semajnoj (de 30 julio ĝis 27 aŭgusto 1949) kun Ĉe-metodaj kursoj de Esperanto. Detalaj informoj aperas aparte en La Praktiko. La liga estraro varme rekomendas al la membroj partopreni kaj varbi partoprenantojn, speciale ne-esperantistajn, kiuj povos tie ellerni nian lingvon.


168. — MONDFEDERALISTA MANIFESTACIO EN HAGO. — La 12-an de novembro okazis en Hago, en la salonego de la Zoologia Ĝardeno, granda manifestacio por mondfederacio organizita de la Nederlanda Mondfederalista Movado. Eminentaj oratoroj pritraktis la temon e diversaj vidpunktoj. La kunvenon, en kiu parto prenis pli ol 1500 personoj, prezidis s-ino Julia Isbrucker, vicprezidantino de U.L.

Kreskigu nian Ligon! Varbu novajn membrojn!



MEMBROJ

61 centoj



BRIKOJ

49 miloj

La ŝtato de la Universala Ligo en novembro 1948.

La maldekstra kvadrato montras la nombron de la aliĝintaj membroj en centoj (unu nigra rondeto signifas 100 membrojn), la dekstra

kvadrato montras la nombron de la kolektitaj brikoj en miloj (unu nigra bloketo signifas 1000 brikojn).

INTERNACIA FERIO

de Universala Ligo

kun Ĉe-metodaj Esperanto-kursoj

en Dover (Anglujo), 30 julio - 27 aŭgusto 1949.

Laŭ la modelo de la sukcesplena Internacia Ferio en Surrey Crest, la Brita Oficejo de Universala Ligo aranĝos ankaŭ en la somero de 1949 Internacian Esperantistan Ferion por membroj de UL kaj aliaj gastoj.

La loko de la Ferio estos la „Crabble Conference House” (Konferenca Domo de Crabble) en la fama havena urbo Dover sur la sudangla marbordo, la ĉefa transvetura punkto de la Kanalo.

Dum la kvar semajnoj de la Ferio okazos ankaŭ Ĉe-metodaj Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj. Ĉar la nombro de la lokoj estas limigita, baldaŭa aliĝo estas rekomendinda. Ĉi tie sekvas kelkaj detaloj pri la aranĝoj kaj pri la aliĝo.

*

La „Konferenceto de Crabble” estas hejmeca domo, la ĉambroj estas sufiĉe grandaj por nia celo de 20 ĝis 25 gastoj. Antaŭ la domo estas razeno ombrita de arboj, kaj alta antikva muro ŝirmas ĝin de la ventoj. Dum la belaj tagoj la ĝardeno estos nia studejo. De tie oni povas vidi tra la arboj la rivereton, kiu formas unu limon de la bieno. La manĝoĉambro, dorĉoĉambroj kaj kursĉambroj estas sub unu tegmento, kaj ili estos nia Esperanto-Domo dum la kvar semajnoj.

La posedanto de la Konferenceto, *s-ino Robertson*, estas esperantistino, do ni spertos ferion en vera Esperantujo. La gastigantino estos *s-ino C. Major* el Londono, kiu plenumis ĉi tiun oficon ankaŭ en Surrey Crest.

En ĉiu semajno de la Ferio okazos Ĉe-metodaj Esperanto-kursoj sub la gvido de „*Persi Pravo*” (*P. L. Wright, F.R.S.A.*), kaj laŭ la bezonoj de niaj gastoj pluajn kursetojn gvidos *s-ino C. Major*. Kvankam necesas, ke la Ĉe-kursoj ne forestu eĉ unu lecionon, la kromaranĝoj estos pli-malpli laŭ la gustoj de la partoprenantoj.

La domo situas tiel, ke laŭ propra elekto oni povas ripozi en la ĝardeno, vagadi sur la montetaro, naĝadi, furi ekskursojn sur la maro aŭ viziti la allogaĵojn de la urbo Dover mem kaj de la apudaj marbordaj urboj. Por ĉiu gusto estos io.

La kursoj.

En ĉiu semajno de la ferio estos nova Ĉe-kurso; la lecionoj okazos de la 10-a ĝis la 12-a kaj de la 17,30 ĝis la 19-a.

Komencantoj, kiuj povos resti dum pli ol unu semajno, povos esti aliĝi al unu el la aliaj kursetoj.

La Ĉe-kurso donos al la kursanoj la kapablon paroli simplan Esperanton, kaj la aŭdado dum la liberaj horoj de multe da Esperanta konversacio multe helpas al ili.

Ni urĝe petas la esperantistojn, ke ili disvastigu inter la ne-esperantista publiko la informon pri ĉi tiuj kursoj.

Se vi mem intencas viziti la Universalan Kongreson en Bournemouth, venigu kun vi ne-esperantistan amik(in)on. Tiu partoprenu en nia Ĉe-kurso, dum vi estas en Bournemouth, kaj vi mem venu kaj pasigu antaŭan aŭ postan semajnon kun la amiko en nia Esperanto-Domo.

Se vi preferas pli intiman rondon ol estas ebla en granda kongreso, pasigu kun ni agrablan ferion, dum la amiko kun plezuro kaj multe da ridado faras stajn unuajn paŝojn en Esperantujo. Jen okazos, ja kaptinda, por allogi viajn konatojn en nian movadon. Vi rajtas promesi al ili intereson, amuzon kaj akiron de la elementoj de la mondlingvo en feliĉa, diversnacia kursanaro.

Fine, ne forgesu, ke nia Ferio okazos en historia loko, ĉar en Dover (kaj la franca urbo Calais) okazis la unua internacia kunveno esperantista, la 8-an de aŭgusto 1904.

Tarifo.

Vi povas aliĝi por unu, du aŭ tri semajnoj per £5-0-0 semajne, inkluzive de lito en du-, kvar- aŭ ses-lita ĉambro, ĉiuj manĝoj kaj partopreno en unu el la kursoj.

Pro tio, ke el kelkaj landoj ne estas eble kunporti monon, vi povos utiligi la jenan sistemon de „*Reciproka Gastigo*”:

Vi pagu al la UL-Reprezentanto en via lando por la feria kotizo kaj por la kromelspezoj en vialanda mono, kaj ni pagos al vi ĉi tie la egalvaloron en brita mono.

Por ĉiu semajno oni devas fari antaŭpagon de £1-0-0.

Aliĝilon kaj pliajn informojn petu de la UL-Reprezentanto de via lando aŭ de la Centra Oficejo de UL en Hago.

BRITA OFICEJO DE UNIVERSALA LIGO
P. L. Wright, 5 Hoppers Road, London N 13.



„Ankaŭ ĉi tie mi ne trovis hejmon.”

Amikeco

Ho, la konsolo, - la neesprimebla konsolo,
senti sin sekura kun unu homo!

Ne bezoni mezuri la pensojn kaj vortojn,
sed elverŝi ilin, senrezerve,
ĝuste tiel, kiel ili venas:
greno kaj ŝelo kune

Kaj esti certa, ke fidele mano
kaptos kaj kribros ilin,
kaj tenos, kio estas teninda, -
kaj per la spiro de la amo
forblivos la reston

Dinah Maria Mulock Craik.

„LA KRISTO DE LA ANDOJ”

Laŭ Profesoro Gilbert Murray.

En la montoĉeno de la Andoj, sur la plej alta punkto de la limo inter Ĉilio kaj Argentino, leviĝas en la alteco de 13000 futoj super la marsurfaco giganta bronzaj Kristo-figuro, 50 futojn alta. La dekstra mano estas bene etendita kaj la maldekstra tenas la krucon. Kaj sub la statuo estas legeblaj la vortoj:

„Pli frue ĉi tiuj montoj disfalis kaj neniĝos, ol ke la popoloj de Ĉilio kaj Argentino rompos sian solenan interkonsenton, sigelitan per juro ĉe la piedo de Kristo.”

Sur la alia flanko estas skribite: „Li estas nia paco, kiu nin unuigas.” La grandioza statuo vekas en ĉiu profundan impreson.

Dum la dua duono de la dek-naŭa jarcento daŭre okazadis militoj inter multaj sud-amerikaj ŝtatoj. La militoj nutris la malamon kaj la malamom kondukis al novaj militoj. La situacio estis senespera. La popoloj malriĉiĝis kaj vivis en konstanta angoro.

Tamen ĝis tiam ankoraŭ neniam eksplodis milito inter la respublikoj Ĉilio kaj Argentino. Sed ekzistis jam dum jaroj konflikto pro certa limregiono, kaj en 1899, do precize antaŭ kvindek jaroj, ĝi tiel akriĝis, ke ambaŭ landoj preparis sin al milito. Ili konstruis milit-ŝipojn, fabrikis armilojn kaj la impostoj ĉiam pli kaj pli altiĝis. Ĉirkaŭ pasko ambaŭ ŝtatoj estis pretaj por la milito... unu fajrero povis eksplodigi ĝin.

Guste en tiu tempo oni laŭkulture festis ĉe ambaŭ flankoj de la Andoj la paskan semajnon. Monsinjoro *Benavente*, argentina episkopo, predikis en la ĉefurbo de Argentino, Buenos Aires. Sed tiufoje ĝi ne estis ordinara paskprediko: ĝi estis fervora, entuziasmigita pledado por paco en la nomo de Kristo.

La mesaĝo disvastiĝis ankaŭ ĉe la alia flanko de la Andoj kaj tie unu ĉilia episkopo transprenis ĝin. Ambaŭ episkopoj eliris, ĉiu en la propra lando, de urbo al urbo, de vilaĝo al vilaĝo, por prediki pacon kaj interamikiĝon. En la komenco nur kelkaj virinoj kaj pastroj aŭskultadis, sed iom post iom sekvis grandaj amasoj kaj el malproksimaj regionoj la kamparanoj venadis por aŭskulti la alvokon. La tuta lando vekigis. Fine la du popoloj devigis

ambaŭ registarojn fari tiujn paŝojn, kiuj gvidos al daŭra paco.

Jam antaŭe oni turnis sin pro ĉi tiu limkonflikto al la angla reĝino *Victoria* kiel juĝantino, sed senrezulte. Nun reĝo *Edward* senprokraste faris la juĝon. La regionoj, pri kiuj oni disputis, estis dividataj. Kaj tiamaniere du popoloj, kiuj volis la pacon, efektive morale devigis siajn registarojn en 1902 fari arbitracian traktaton sen ia kondiĉo: unu el la unuaj, de post la tempo de la antikva Grekujo. Ambaŭ landoj devigis sin solvi siajn konfliktojn per arbitracio dum periodo de kvin jaroj, kaj ili interkonsentis pri parta forigo de armeoj kaj militŝiparoj.

De post tiu tempo ambaŭ respublikoj faris ankaŭ kun aliaj registaroj similajn traktatojn. Iliaj armeoj forte malkreskis, milit-

ŝipoj estis vendataj aŭ transformataj en komercajn ŝipojn. El la granda arsenalo de Ĉilio fariĝis teknika lernejo. La mono tiamaniere ŝparita servis por laboroj de ĝenerala utilo, por fervojoj kaj konstruado de domoj.

Sed la plej rimarkinda afero estis la granda ŝanĝiĝo en la rilatoj inter la du ŝtatoj: fido anstataŭis la malamikecon. Ili riskis iri la vojon de paco — kaj la rezulto estis por ili ambaŭ vera beno!

La episkopo, kies apostola predikado malhelpis la militon en 1900, havis la fortan deziron, ke iam oni starigu statuon de Kristo kiel memorajon pri la interamikiĝo de la du popoloj. *Dona Angela de Coste*, la prezidantino de la sud-amerika pacligo, proponis, ke la statuo estu metata sur la plej altan lokon de la limo, kaj tio okazis per la kunlaboro de la du nacioj. El la kanonoj de la limfortikaĵoj oni fandis en la arsenalo de Buenos Aires grandiozan Kristo-statuon. La argentina registaro prenis sur sin la taskon transporti ĝin al la preskaŭ neatingebla montosupro sur la landlimo. La statuo iris per trajno ĝis kie la fervojo finiĝis. De tie muloj iris sur afusto, kaj kie eĉ la muloj ne povis plu iri, soldatoj kaj maristoj de ambaŭ landoj trenis la statuon kun unuigitaj fortoj supren ĝis la plej alta punkto.

La 13-an de marto 1904 la Kristo-statuo estis inaŭgurata en la ĉeesto de granda publiko civila kaj militista el ambaŭ landoj. La argentinaj soldatoj kampadis en Ĉilio, la ĉiliaj en Argentino. Militista muziko kaj tondrado de kanonoj proklamis la sigelon de la leĝo de la paco. Dum profunda silento la lastaj kovraĵoj falis kaj poste en ambaŭ landoj leviĝis ĉie la preĝoj por paco en la tuta mondo.

La starigo de la statuo de „Kristo de la Andoj” signifas turnopunkton en la historio de la du sudamerikaj landoj, Argentino kaj Ĉilio. Post tiu tempo la du landoj ne havis militon, kaj eĉ la ondoj de la du mondmilitoj apenaŭ tuŝis ilin. La interpacigo enkondukis en la historio de ambaŭ landoj periodon de granda prospero ekonomia kaj kultura, kies valoro sen ia dubo multfoje superas la rezultatojn de la plej brila venko en iu eventuala milito.

En 1899, la sama jaro, en kiu la sudamerikaj episkopoj komencis sian apostolan pacpredikadon, okazis en Hago la historia packongreso, kiu kondukis al la starigo de la *Konstanta Internacia Arbitracia Tribunal*. Baldaŭ, en la jaro 1913, oni inaŭguris en Hago la majestatan *Pacpalacon*, en kiu ni retrovas la inspirantan statuon de la Kristo de la Andoj, ĉar la registaroj de Argentino kaj Ĉilio donacis al la Pacpalaco malgrandigitan kopion de la fama statuo.

Ĉu staros iam similaj monumentoj sur la landlimoj inter la nun ankoraŭ konkurantaj kaj kverelantaj najbaroj?



„EN LA NOMO DE LA POPOLOJ DE LA MONDO, KIUJ ĈI TIE NE ESTAS REPRESENTATAJ!”

GARRY DAVIS,
„la unua mondcivitano”.

Garry Davis, la juna amerikano, kiu servis kiel bombjetanto dum la lasta milito, rezignis pri sia usona ŝtataneco, por fariĝi mondcivitano. Lia kuraĝa ago, interrompi la kunsidon de la Generala Kunveno de la Unuiĝintaj Nacioj en la palaco de

tuantan kunvenon, kiu levos la standardon, sub kiu ĉiuj homoj povos unuiĝi, la standardon de unu registaro por ĉi tiu unu mondo.

Se vi ne plenumos ĉi tiun devon, malaperu tiam, por ke la unuiĝintaj popoloj mem starigu tian registaron.

Ĉar nur tio povos nin helpi!

Estas esperiga fakto, ke dudek-mil parizanoj ĉeestis la demonstracion por mondregistaro. Parolis tie André Breton, Profesoro Girard, David Rousset, Monnier, Abbé Pierre, Sarrazac, Jean Paulhan kaj Vercors. André Gide sendis mesaĝon de simpatio.

Oni komunikis tie la respondon de D-ro Evatt, prezidanto de la Generala Kunveno de la UNO. Li skribis al Garry Davis interalie: „Mi simpatias kun via agado kaj mi estas preta transdoni al ĉiuj delegacioj la tekston, kiun vi intencas direkti al mi.”

En diversaj landoj okazas manifestacioj por montri al la simpla civitano, ke li ne staras sola en la batalo por la paco, kaj ke li povas kalkuli je la subteno de multaj.

En Britujo dudek-du parlamentanoj deklaris solidarecon kun Davis kaj ili sendis al D-ro Evatt la sekvantan leteron:

„Ni, subskribintoj, ekzamenis la deklaron de Garry Davis, kiun li submetis la 19-an de novembro al la prezidanto de la Generala Kunveno de la U.N. Ĝi meritas nian plej grandan subtenon. Ni estas konsciaj pri tio, ke la popoloj de la mondo arde sopiras al paco, kaj ni humile petas vin plilongigi vian kunvenon per unu semajno, aŭ almenaŭ per unu tago, por studi la deklaron de Davis.” Ĉi tiun leteron subskribis dudek-du parlamentanoj, inter kiuj Henry Usborne kaj John Boyd Orr.

La ekzemplo de Garry Davis kuraĝigis ankaŭ en aliaj landoj la adeptojn de mondcivitaneco al agado. Ni ricevis informojn pri la organizado de mondcivitanaj grupoj kaj pri tio, ke Garry Davis jam ricevis invitojn el diversaj landoj, eĉ el Berlino.

Ni povas denove konstati, ke unu simpla, sed kuraĝa homo povas ekmovi milojn! Tio donas esperon! La vero marŝas!



Dum la granda kunveno en la Vintra Sporthalo de Parizo, kie 20,000 parizanoj faris potencon demonstracion por mondregistaro, la publiko en ekstazo ovacis la kuraĝulon Garry Davis. Miloj da homoj kuregis al la podio por premi liajn manojn.

Chaillot en Parizo, faris lin mondfama. Liaj simplaj kaj sinceraj vortoj trovis eĥon ĉe miloj da simplaj homoj kaj ĉe pluraj eminentuloj. Li diris:

Sinjoro Prezidanto! Sinjoroj!

En la nomo de tiuj popoloj, kiuj ne estas ĉi tie reprezentataj, mi interrompas vin. Miaj vortoj sendube estas sensignifaj por vi. Kaj tamen oni ne povas plu neglekti nian komunan bezonon al mondordigo.

Ni, la popoloj, deziras la pacon, kiun nur mondregistaro povos doni al ni.

La suverenaj ŝtatoj, kiujn vi reprezentas ĉi tie, dividas nin, la popolojn de ĉi tiu mondo, kaj kondukas nin al la abismo de milito.


Mi apelacias al vi, por ke vi ne plu igu nin kredi al la iluzio de via politika aŭtoritato.

Mi apelacias al vi, por ke vi tuj kunvoku tutmondan konsti-

*La mondo estas unu lando!
La homaro estas unu popolo!*



En Islando rapide disvastiĝas nia lingvo. En diversaj lokoj Esperanto-kursoj gvidataj de la internacia Esperanto-instruisto kaj gisto D-ro Mildwurf el Londono. Aktiva Membro de U.I.L. Nia bilzentas grupon de gajaj gejunuloj, kiuj entuziasme lernas Esperanto esperas interamikiĝi per la mondlingvo kun gejunuloj el alie. En la mezo sidas la kursgvidanto, D-ro A. Mildwurf.



La enirejo de la „Internacia Domo”.

STUDENTURBO

La „Cité Universitaire”
en Parizo.

Antaŭ kelka tempo en Amsterdamo oni konsideris la eblecon starigi studentan kvartalon. La propono estis, rezervi iun parton de la urbo por enloĝigi studentojn, kiuj studas en la nederlanda ĉefurbo. Ĉu

tiuj planoj povos efektiviĝi, kaj se jes, tiam en kiu maniero kaj en kiaj mezuroj, tio ankoraŭ ne estas certa. Sed la ĉefurbo de Francujo jam solvis ĉi tiun problemon en eleganta maniero, en la formo de spe-

ciala urboparto, nomata „Cité Universitaire” (Universitata Urbo). Ĝi bonege povos servi kiel imitinda ekzemplo, kaj ĝi meritas esti prezentata al la tutmonda publiko.

Por ricevi la necesan terenon, oni komencis malkonstrui malnovan kvartalon, en la sudo de Parizo, dek minutojn de la Universitato, kie staris malbelaj kazernoj kaj armilfabrikoj. Parto de tiu kvartalo estis destinita fariĝi „studenta urbo”.

Bona ideo.


La iniciaton al la konstruado de la universitata urbo prenis la konata franca grandindustriisto *Emile Deutsch de la Meurthe*, kiu ekhavis feliĉan ideon. Lia ideo naskiĝis el la fakto, ke en la Sorbonne, la plej malnova universitato

de Eŭropo, krom francoj studas ankaŭ multaj eksterlandanoj. Li pripensis, ke estus tre utile, se oni fondus unualoke hejmojn por francaj studentoj, sed ankaŭ hejmojn por alilandanoj. Kaj li komprenis, ke la diversaj nacioj mem devus havi la rajton elekti la specon de konstruaĵo, kiun ili preferas. Kaj tial en la studenta urbo troviĝas nun sep domoj por la francaj studentoj, inter kiuj unu speciale por knabinoj, ĉiuj kune kun 340 ĉambroj. Oni inaŭguris tiujn hejmojn la 25-an de julio 1925. Plue oni vidas en la Universitata Urbo la diversajn eksterlandajn pavilonojn. Ĉiu lando sekvis sian propran guston, tiel ke la studenta urbo nun posedas ankaŭ specon de japana tedomo, strangan grekan templon, ĉarman svedan kamparan domon kaj pompan hispanan pavilonon, kiu forte memorigas al la hispana reĝa kastelo *Escorial* apud Madrido.


Krom tiuj estas tie ankaŭ hejmoj de Belgujo, Danujo, Svisujo, Anglujo, Kanado, Nederlando, Argentino, Hindociĉnujo, Armenujo, Kubo kaj Monako.

Kiuj loĝas en ĉi tiuj hejmoj?

Principe la ĉambroj de tiuj domoj estas destinitaj por la studentoj de la landoj, kiuj fondis ilin, sed la plej multaj pavilonoj estas konstruitaj kun subvencio de la Franca Nacia Fondaĵo, kaj pro tio ĉi tiu fondaĵo havas la rajton rezervi limigitan nombron da lokoj por francaj studentoj kaj por tiaj studentoj, kiuj ne havas propran pavilonon. En la plej multaj hejmoj oni povas elekti inter unu- aŭ dupersona ĉambroj; en ĉiu hejmo estas komuna sa-



En ĉi tiu konstruaĵo preferas loĝi la belgaj junuloj, kiuj studas en Parizo.



La grekaj studentoj restas fidele al siaj temploj, kiel montras ĉi tiu bildo pri ilia domo.

lono aŭ konversacia salono. kaj biblioteko aŭ muziksalono.

La „Internacia Domo“.

Oni ne manĝas en la hejmoj, sed en la restoracio de la *Internacia Domo*, kiu situas en la mezo de la Universitata Urbo kaj kiu estas frata institucio de la *Rockefeller-Fondajo* en la diversaj amerikaj universitataj urboj.

Ankaŭ ĉi tiu fondajo en Parizo estas kreita per la kapitalo de *John D. Rockefeller*. En la Internacia Domo estas diversaj komunaj studĉambroj, vasta biblioteko kaj teatro, kie la plej bonaj aktoroj de Parizo donas prezentadojn je tre malaltigitaj prezoj, kaj kie unufoje en la semajno estas montrata nova aŭ malnova pionira filmo. Tiuj studentoj, kiuj ŝatas muziki, povas lui muzikĉambbron kun aŭ sen piano, tiel ke ili povas trankvile studi, ne ĝenanite aliajn.

Oni zorgis ankaŭ pri tio, ke la studentoj povu distri sin; en la sama domo estas naĝbaseno, salono por tablo-teniso, gimnastikejo, kafejo kaj dancsalono. Kaj plie troviĝas en la Universitata Urbo ankaŭ propra poŝtoŭicejo kaj malsanulejo, kie la studentoj senpage estas flegataj.

La restoracio.

Sed la centro de la Universitata Urbo kaj ankaŭ de la Internacia Domo estas la restoracio. Ĉi tie manĝas kaj renkontiĝas ĉiutage proksimume 3000 studentoj.

Ĉe la diversaj tabloj oni interŝanĝas ideojn; la okcidentanoj konatiĝas kun la orientanoj, blondaj norduloj konversacias kun siaj nigraj fratoj, kaj tie oni faras interkonsentojn por instrui reciproke siajn lingvojn.

Dum la manĝoj junaj entuziasmuloj atakas la ekzistencialismon, aliaj defendas ĝin. Ĉi tiu nova pariza modo, kreita de *Sartre*, ekscitas la animojn same kiel la politikaj problemoj, pri kiuj ĉiu havas alian opinion laŭ siaj raso kaj nacieco.

La lernantoj de la Belarta Akademio zorgas por ŝercoj kaj gajeco, kaj eltrovas dum la manĝoj ĉiam novajn petolaĵojn por vivi en Parizon.

Ĉi tie oni komprenas, kion celis *John D. Rockefeller*, kiam li donis ĉi tiun fondajon. Kaj ĉi tie la vortoj sur la tabulo en la halo, kiuj parolas pri amikeco kaj reciproka interkompreniĝo, veriĝas.

Ĉi tiu internacia „studenturbo“ estas tute nova kaj nekonata afero por tiuj landoj kaj urboj, en kies universitatoj kutime studas nur enlandaj studentoj. Sed en la *Cité Universitaire* de Parizo neniu nuras, kiam ni hungaro enpaŝas en la restoracion en sia nacia kostumo, aŭ skota studento en sia ĵupeto. Ĉi tie ĉiu sentas, ke la negraj kolegoj estas tre agrablaj kamaradoj.

Por la studentoj el la nordaj popoloj en Parizo estas frapanta sperto, ke en Francujo mankas tiu kamaradeco inter knaboj kaj knabinoj, kiu tiel rimarkinde karakterizas la nordajn landojn.


En la nordaj landoj knaboj kaj knabinoj estas kune edukataj, kio kaŭzas ĉe ili kamaradan interrilatadon. Sed en Francujo tio ne estas ebla, ĉar en la malaltaj kaj mezaj lernejoj la du seksoj estas severe apartigitaj. Eĉ en kelkaj altlernejoj regas ĉi tiu sistemo.

Tio estas bone rimarkebla ankaŭ en la Universitata Urbo de Parizo, ĉar en la ĉambroj de la plej multaj domoj rajtas loĝi nur viroj. Pro tio la nombro de la studentinoj loĝantaj en la Universitata Urbo estas tre malgranda. La solaj pavilonoj, kiuj disponigas ĉambrojn ne nur al studentoj, sed ankaŭ al studentinoj, estas tiuj de la nordaj landoj: Danujo, Britujo, Usono kaj Nederlando.

Inter la pavilonoj oni aparte rimarkas la nederlandan, kiu estas konstruita en la plej moderna stilo laŭ la planoj de la fama nederlanda arkitekto *Dudok*. Ĝi ne sekvas la regulon observitan de la ceteraj pavilonoj, kiuj klopodis kopii iun hejmlandan karakterizadon. Ekzemple la greka domo imitas antikvan grekan templon, sed nepre ne kun grandega sukceso. Kaj oni povus nomi plurajn tiajn ekzemplojn de malĝuste aplikita



La domo, en kiu la japanaj studentoj loĝas, multe similas al tedomo.



La hotelo de la nederlandaj studentoj, konstruita laŭ la planoj de la fama nederlanda arkitekto *Dudok*.

naciismo. Kontraŭ ĉi tiuj ĉe la konstruado de la nederlanda domo la gvidanta principo estis: doni al la gestudentoj, kiuj en ĝi loĝos, kiel eble plej multan lumon, spacon kaj komforton.

Alia afero, en kiu la nederlanda domo diferencas de la ceteraj, estas tio, ke ĝi posedas ankaŭ propran kuirejon, en kiu la gestudentoj povas prepari siajn manĝaĵojn. Pro tio en la bela halo, kiu estas uzata ankaŭ kiel manĝejo, regas ĉiam speciala, tre intima sfero.

La granda utileco de ĉi tiu Universitata Urbo en Parizo konsistas ne nur en tio, ke ĝi donas al la junularo taŭgan hejmon kun favoraj kondiĉoj por ilia studado, sed ankaŭ en tio, ke ĝi en granda mezuro akcelas la internacian amikiĝon per la kono kaj kompreno de la fremdaj popoloj kaj ilia vivmaniero.

(Laŭ *H. v. E.* en „*Wereldkroniek*“, Hago.)

LA HAVAJA INSULARO

„Lando de la eterna printempo”.

Pearl Harbour! Kiel bone ni memoras ankoraŭ ĉi tiun nomon! La strategia signifo de la Havajaj Insuloj estis ege granda por la Unuiĝintaj Statoj. Ili estis la malproksimaj gardistoj de la interesoj de Ameriko. Jam dum multaj jaroj ĉi tiu bela insulgrupo estis la centro de la amerikaj planoj. Pearl Harbour estis potenca ŝipbazo kaj oni sentis sin sekurita kontraŭ ĉiu ebla atako de kiu ajn flanko pro la tie stacianta militŝiparo. Ankaŭ kiel bazo kontraŭ atako de Japanujo, Havajo multe valoris. Sed . . . la distanco de Honolulu al Jokohamo estas 5300 kilometroj. Tiu distanco donis la plej bonan garantion por la paco. Tial la amerikanoj diris: La Havajaj insuloj estas nevenkebla fortikaĵo en la Pacifika Oceano kaj en pactempo ili ne povas esti rigardataj en Azio kiel minaco.

Kiam oni malkovris la Havajajn insulojn, ili estis loĝataj de duoncivilizita popolo, afabla kaj feliĉa, kiu satis muzikon kaj dancojn, sed sklavo de religio, kies centro estis la tabuo. Loĝante sufiĉe malproksime de la tropikoj, tiel ke ili kutimis labori, la originaj loĝantoj de Havajo evoluis al pli inteligenta kaj korpe pli perfekta raso, ol la popoloj de aliaj insuloj en la Pacifika Oceano.

La angla maristo kaj esploristo *James Cook* alvenis tie en 1778. Ĝis tiam la havajanoj jam vivis tie dum nekalkuleblaj jarcentoj; ili estis jam bonegaj naĝantoj, spertaj en la kanotveturado kaj lertaj en la farado de laboriloj el rokoj kaj lafo. Ili ankoraŭ ne konis metalojn. Iliaj kanotoj havis kelkfoje longecon de 70 futoj, faritaj per ŝtonaj iloj el la grandegaj *koa*-arboj. Oni opinias — sed tio estas nur supozo, — ke la polinezianoj, al kiuj

apartenas la havajanoj, en la pratempo venis el Hindujo. La marvojaĝoj en iliaj kanotoj egalas tiujn de la vikingoj.

El la basto de certa arbospeco la indiĝena loĝantaro faris specon de papera ŝtofo, kaj ĝin admirinde bele kolorigis; tiu *tapa*-ŝtofo servis por donacoj. La Havajaj insuloj estis regataj de grandaj reĝoj, kiuj regis tie kun absoluta potenco. Iliaj oficialaj vestoj estis farataj el plumoj; kelkaj el tiuj plumaj vestoj ekzistas ankoraŭ. En la muzeo de Honolulu troviĝas unu, kiu valoras milionon da dolaroj.



La dio Lono.

En 1778 la enloĝantoj salutis kapitanon Cook, kiu nomis la insularon *Sandwich*-insuloj, kiel la dion *Lono*. Oni donis al li templon en Napupu kaj adoris lin. Sed liaj ŝipanoj estis senskrupulaj; ili detruis la sanktajn lokojn, kaj kiam unu el ili mortis, la havajanoj komprenis, ke la blankuloj ne estas dioj, sed povas morti kiel ili mem.

Malamikeco anstataŭis la adoron. Cook estis mortigata; lia karno estis ŝirata de la ostoj kaj jetata antaŭ la hundojn. La koro restis, sed laŭ malnova historia verkisto du knaboj supozis, ke ĝi estas la koro de porko, kaj formangiĝis ĝin.

En tiu tempo la hommanĝado estis ĝenerala kutimo de la havajanoj; ili trovis tion tute natura. La historio mencias, ke ili elkavigis arbotrunkojn kaj faris el ili bele ornamitajn kaj poluritajn potojn, ke ili faris belformajn rondajn pladojn por manĝi el ili, kaj kukurbojn kaj felojn por la trinkajoj, ke ili kuŝis ĉe la manĝotablo kiel la antikvaj grekoj kaj romanoj, sin apogante sur la kubuto kaj manĝante elegante per la dekstra mano. Ankaŭ ekzistis en la tempo de Cook temploj, kiel antaŭe en Palestino, kien la krimuloj povis forkuri kaj kie ili estis netuŝeblaj.

Ameriko malkovras Havajon.

Post la tria esplorvojaĝo de kapitano Cook, dum kiu li malkovris la Havajon insularon, la intereso por Havajo en Ameriko vekigis nur, kiam grupo de misiistoj, kune dudek-tri viroj kaj virinoj, en 1819 el Bostono vojaĝis tien, allogitaj de la rakontoj de balenkaptistoj. Ili ricevis koran akcepton. Iom post iom sentiĝis la influo de tiu misio. La popolo lernis legi kaj skribi, kaj kvankam la propraj moroj perdiĝis, anstataŭitaj de fremdaj moroj, la enloĝantoj de Havajo havis multe pli bonan vivon sub la influo de la misiistoj, ol tiuj de la aliaj insuloj, kien aventuristoj kaj komercistoj portis la civilizon.

La aneksado baldaŭ sekvis, kaj Havajo transiris en la posedon de Usono. En la fiska jaro 1921 la popolo de la havaja teritorio alportis jam la sumon de 22 milionoj da dolaroj en la ŝtatan kason en Vaŝingtono kiel doganpagojn kaj impostojn. Krom tio Havajo mem pagis ne nur la kostojn de la trupoj, kiuj sur la insularo restadas, sed ankaŭ ĉiujn fortikaĵojn, maristajn instalaĵojn kaj entute ĉiujn kostojn por la defendo. Plue, la insularo mem portis ĉiujn elspezojn por la lernejoj, vojoj, polico, agrikulturo, k.t.p. de la lando.

Laŭ la konstitucio („*Bill of Rights*”) la Havajaj insuloj ne estis „insula posedaĵo” de Usono, sed memstara parto de ĝi. Tio kaŭzis grandan malkontentecon inter la havajanoj. Ili plendis, ke, kvankam ili estas parto de la Unuiĝin-



La fama marborda banejo de Waikiki kun siaj grandaj hoteloj.

taj ŝtatoj kaj pagas pli al la ŝtata kaso ol la dek-naŭ diversaj ŝtatoj, ili ne ricevis la civitanajn rajtojn, ne havas reprezentantojn, nek voĉdonrajton, kaj ili ne ricevas federacion subtenon.

Nuntempe la Havajaj insuloj estas regataj de gubernatoro, nomita de la prezidanto de la Unuiĝintaj Ŝtatoj, kaj asistata de senato kaj ĉambro de reprezentantoj.

Mondurbo en la oceano.

Tiu, kiu vizitas Honoluluan por la unua fojo, ne povas kredi al siaj okuloj. Ĉie taksioj kaj luksaj aŭtomobiloj. La plej modernaj hoteloj povas kontentigi la plej dorlotitajn gastojn. Aperadas matenaj kaj vesperaj ĵurnaloj kun detalaj telegramservoj. Ili anoncas ĉiutage la kompletajn borsajn notadojn de Novjorko kaj la sportraportojn. La grandaj magazenoj estas plenplenaj de homoj, kiuj deziras aĉeti la plej novajn novaĵojn el Parizo, Novjorko kaj Londono. Moderne ekipita universitato, bonegaj lernejoj, belegaj klubejoj kun brilaj sportkampoj, Carnegie-biblioteko, elektraj tramvojoj, mondfama laboratorio, fabrikejo, kiu produktas ĉiutage unu milionon da ladskatoloj da ananas-konservo, kaj mil aliaj aferoj montras, ke ĉi tie kuŝas amerika mondurbo, en distanco de miloj da mejloj de ĉiu kontinento.

Bonega klimato.

La plej grandan diversecon en klimato kaj pluvado oni trovas sur la 14.715 kvadratkilometroj, kiuj kune formas la ok ĉefajn Havajajn insulojn. Sur la monto *Vajaleale* de la insulo *Kauai* falas jare 1200 centimetroj da pluvo, tio estas la plej multa pluvo de la mondo, kaj dudek-kvin kilometrojn pli malproksime falas nur 55 centimetroj jare. Sed la fidelaj ventoj de la granda Pacifiko tiel regule kaj potence blovas super ĉi tiuj insuloj, ke tamen la klimato estas belega. Pro la neegala pluvado oni bezonis grandajn irigaciajn verkojn por la sukero; unu plantejo uzas pli da akvo ol la tuta urbo San Francisko. La sukereksperto atingis en unu normala jaro la valoron de 200 milionoj da dolaroj.

Ne malpli grava estas la ananaso; ekzistas fabriko, kiu labo-



En la Waikiki-distrikto de Honolulua.

rigas kvarmil homojn. Antaŭ kelkaj jaroj venis la unuaj ananasoj en Havajon el Nederland-Hindujo. Kelkaj portis abundon da fruktoj, tiel multajn, ke baldaŭ estis tro multaj por la havaja uzo kaj la seniluziigintaj plantistoj hakis la plantojn kaj jetis ilin sur la sterkejon. Kelkaj malriĉaj kamparanoj prenis de tie kelkajn duonputriĝintajn plantojn kaj plantis ilin denove. Denove fariĝis riĉa rikolto. Nun ili konstruis malgrandan laborejon por eksporti la troaĵon. El tiu malgranda komenco elkreskis industrio tiel granda, ke la Havajaj insuloj nun eksportas ĉiujare pli ol kvin milionojn da kestoj kun enladigitaj ananasoj.

(Laŭ J. Melis en n-ro 20 de „Wereld”, Hago.)

AL LA VENKO!

988 La Skand'nava Aervetura Sistemo uzas Esperanton. — La aertrafika oficejo SAS (Scandinavian Airlines System), kiu unuigas en si la danan, norvegan kaj svedan aerveturajn organizaĵojn, antaŭ la lasta Universala Esperanto-Kongreso, okazinta en la monato aŭgusto en Malmö, dissendis al la aliĝintaj kongresanoj Esperanto-lingvajn leterojn, proponante siajn servojn por la kongresa vojaĝo. — (Laŭ ricevitaj informoj multaj kongresanoj uzis por sia vojaĝo la skandinavajn flugmaŝinojn, donante per tio la ĝustan respondon je la inteligenta kaj eleganta gesto de la SAS).

989. Nederlandaj urboj postulas la instruadon de Esperanto. — La urbkonsilantaroj de *Hengelo* (en kunsido de la 23-XI-1948) kaj *Jutphaas* (en kunsido de la 1-XI-1948) decidis peti la Ministron de Instruado, Artoj kaj Sciencoj, ke la deviga instruado de la lingvo Esperanto estu kiel eble plej baldaŭ komencata en ĉiuj instruistaj kaj instruistaj edukejoj en Nederlando. — (La agado por la instruado de Esperanto en la nederlandaj lernejoj estas gvidata de la „Oficejo Esperanto en la Instruado”, C. Krusemanstraat 43.III, Amsterdam.)

990. Esperanto en naturscienca gazeto. — La monata bulteno de la Entomologia Societo de Mulhouse (Francujo) komencis publikigi Esperanto-lingvajn resumojn de la artikoloj. La societo uzas Esperanton en siaj internaciaj interrilatoj. Ĝi deziras starigi regulan interŝanĝ-servon kun natur-

sciencaj fakrevuoj de la tuta mondo kaj proponas adopti la uzadon de Esperanto. — (La jara abonkotizo de la bulteno estas 150 fr. frankoj aŭ 10 respondkuponoj. Specimeno estas senpage sendata. Interesiĝantoj turnu sin al la Esperanto-korespondisto de la societo: s-ro A. Lienhardt, 24 faubourg de Riedisheim, Mulhouse, Francujo.)

991. Turisma prospekto en Esperanto pri Bournemouth. — La urbestro de la fama marborda banloko Bournemouth en suda Anglujo eldonis kolorprese ilustritan faldprospekton kun la urboplano kaj diversaj informoj por la vizitantoj. En la urbo Bournemouth okazos la proksima, 34-a Universala Esperanto-Kongreso, en aŭgusto 1949. — (La bela prospekto estas senpage ricevebla de la Oficiala Inĝenieroj de la urbo, kontraŭ peto.)

992. Esperanto-rubriko en brazila ĵurnalo. — La matena ĵurnalo „A República”, aperanta en la brazila urbo Natal, la 13-an de junio nunjara komencis publikigi regulan ĉiusemajnan rubrikon sub la titolo „Esperanto kaj Esperantismo”. (Ĉi tiu sukceso de nia lingvo estas ŝuldata al s-ro Romildo Gurgel, direktoro de la gazeto, kaj al la fama nordbrazila poeto s-ro Otoniel Menezes, kunlaboranto de la ĵurnalo. — La Esperanto-rubrikon redaktas s-ro Arlindo Castor de Lima. — La adreso de la gazeto: Av. Junqueira Aires 355, Natal, Rio Grande do Norte, Brazilo.)

BONA NOVAĴO DE LA BRAZILA FRONTO!

Grandsukcesa propaganda vizito de Dragutin Wranka, la populara desegnisto de La Praktiko. - Per Ĉe-metodaj demonstracioj, kurso kaj seminario li grave plivigligis la brazilan Esperanto-movadon.

Trankvile pasadis la tagoj en la belega ĉefurbo brazila. Nenio nova en la ĉiutaga vivo; la samaj klopodoj kaj zorgoj en la laborejo, hejme kaj en la Esperanto-Movado. Jes, en la Movado la samaj kunvenoj kaj la samaj gesamideanoj; la samaj kursoj partoprenataj de certa nombro, kiu nepre malpligrandiĝas, dum la lecionoj malrapide antaŭeniras. . .

Sed subite ĉio aliformiĝas! Unu telefonas al alia kaj kombinas horon por renkontiĝo; estas fiksataj kunvenoj, prelegoj, k.t.p. Al mi oni ankaŭ telefonis.

— Sed kio okazas?, — mi demandas.

— Ĉu vi ne scias? Tio estas tre grava! Ĵus alvenis neatendite samideano Wranka. Jes, Dragutin Wranka kun la edzinino! Ĉu vi ne konas lian nomon?

— Wranka?! . . . Ha, jes! Mi memoras! Li desegnas por La Praktiko tiujn interesajn karikaturajn. Jes, jes! Bone! Tre bone! Kion ni aranĝos?

— Bone! Vespere ni renkontiĝos por kombini. . .

. . . Tiamaniere eksplodis la bombo en Rio-de-Janeiro, sed ĝi anstataŭ detrui, centoble plifortigis nian Esperantan vivon. S-ro

Wranka estas entuziasmega esperantisto. Li tuj proponis sin por fari propagandajn demonstraciojn pri la Ĉe-metodo. Kaj ankaŭ por gvidi kurson, se anoncos sin sufiĉe multaj lernemuloj.

Problecionoj kaj kurso.

En Rio-de-Janeiro nur unufoje ni havis tion, okaze de la vizito de la usona samideano *F-ino Tappan* (nun *S-ino Connor*), kaj la ideo tre allogis ĉiun. Oni organizis provlecionon en tri ejoj: *Sindikato de Bankoficistoj*, *Gimnazio Petro II* kaj *Brazila Instituto pri Geografio kaj Statistiko*; ĉie la entuziasmo estis grandega, sed bedaŭrinde nur en la Sindikato estis eble okazigi kurson.

Mankis la presadoj, ĉar oni havis nur kelkajn ekzemplerojn en la bibliotekoj, kaj la esperantistaro ĝenerale nur supraĵe konis la metodon. Tamen, oni rapide ĉion aranĝis tiamaniere, ke S-ano Wranka tuj povis komenci la kurson ĉe la Sindikato, kiun partoprenis 20 gelernantoj, inkluzive kelkaj estraranoj. Estas bedaŭrinde, ke li ne povis resti ĝis la fino kaj ĉeesti la finan lecionon preparitan de S-ano *Nelson de Souza*, kiu anstataŭis S-ano Wranka en la gvidado de la „konversacio“.

Seminario por kursgvidantoj.

Samtempe la vigla jugoslava samideano organizis seminarion en la sidejo de *Brazila Ligo Esperantista*, kie la plej aktivaj Rio-aj gesamideanoj diskutadis la metodon kaj ĝian uzon. Certe tiu estis la plej trafa maniero, ke ni unu fojon por ĉiam enradikigu en Brazilon tiun efikan varbadon de amaso al niaj vicoj.

Ekskurso al Korkovado.

Multajn promenadojn kaj vizitojn gesamideanoj Wranka faris al pitoreskaj lokoj, muzeoj, k.a., sed speciale menciinda estas la ekskurso al *Korkovado*, al kiu ili iris akompanataj nur de gesamideanoj *Moreira*, kiuj neniam estis lernintaj ion pri Esperanto antaŭ ol ĉeesti la kurson de S-ano Dragutin.

Unu dimanĉon frumatene la kvaroj renkontiĝis kaj en aŭtomobilo, sur la agrabla kaj moderna ŝoseo, lukse pavimita, sub tuneloj el gigantaj tropikaj arboj, ili supreniris al la pinto de la fama monto.

„Ĉirkaŭ la urbo staras ĉeno de montoj, el kiuj distingiĝas *Corcovado* (*Korkovado*), kun alteco de 711 metroj, kaj sur kiu staras la grandioza statuo de Kristo Savinto, kun la brakoj disetenditaj horizontale, for-



La partoprenintoj de la seminario por Ĉe-metodaj instruistoj de Esperanto en la brazila ĉefurbo Rio-de-Janeiro, gvidita de s-ro Dragutin Wranka el Jugoslavio. — Sidantaj, de maldekstre: D-ro Miguel Timponi, eminenta juristo kaj politikisto; S-ro Dragutin Wranka; D-ro Carlos Domingues, prezidanto de Brazila Ligo Esperantista; S-ino Serafina Wranka; S-ro Caetano Coutinho, prezidanto de Brazila Klubo „Esperanto“. — Starantaj, de dekstre: F-ino Maria Angelica, estraranino de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro; S-ro Manoel Barbosa, kasisto de AERJ; D-ro Alberto Bonfim, prezidanto de Esperanto-Klubo ĉe YMCA; S-ro Paulo Ludka, membro de la Esperanto-Grupo ĉe la Spiritisma Federacio; S-ro Viana Peixoto, prezidanto de la Grupo de Niteroi; F-ino Baghy de Araujo, kasistino de BLE; S-ro László Zinner, hungara esperantisto; F-ino Maria Malheiro, sekretariino de BKE; F-ino Debora Malheiro, bibliotekistino de BKE; S-ro Nelson de Souza, reprezentanto de Universala Ligo por Brazilo; D-ro Pinto do Carmo, sekretario de BKE; D-ro Braz Cosenza, sekretario de AERJ; S-ro Raimundo Menezes, sekretario de EK ĉe YMCA.

mantaj kun la trunko grandegan krucon. La statuo estas tridek metrojn alta kaj staras sur piedestalo, kiu estas ok metrojn alta.

En la interno de la piedestalo estas konstruita belega kapelo por ĉiama adorado. Ĝi povas enteni ĉirkaŭ cent personojn.

La distanco de la ekstremaĵo de unu mano al tiu de la alia estas 28 metroj.

La tuta monumento, kiu estas farita el subferigita cemento kaj kovrita per mozaiko el trianguloj de brazila ŝtono (steatita), konata kiel „ŝtono-sapo”, pezas du milionojn da kilogramoj.

Ĝi estas belega monumento de fido, scienco kaj arto. Dum la nokto ĝi estas lumigata kaj prezentas neimageblan aspekton.” (El la „Gvidlibro pri Rio-de-Janeiro”, eldonita dum la 9-a Brazila Kongreso de Esperanto.)

Vizito al Santos kaj Sao Paulo.

Jen bedaŭrinde alvenas la tago, kiam la geedzoj Wranka devas forlasi Rion. Tamen, ni samtempe ĝojas, ĉar ili portas al aliaj brazilaj urboj la verdan flamon kaj la promeson de nova, pli vigla periodo en nia Movado.


La eksterordinara agemo de samideano Dragutin tuj evidentiĝis post lia alveno al Santos. Demonstraciojn pri la Ĉe-metodo li faris ĉe la loka *Sindikato de Bankoficistoj* kaj ĉe *Kolegio Kanado*. Estas notinda la fakto, ke ĉe tiu Kolegio studas la estontaj instruistinoj, el kiuj ĉirkaŭ sepdek partoprenis la provolecionon, krom la direktoro, profesoroj kaj aliaj personoj. En tiu urbo gardis la flamon S-ano *Francisco Almada*, entuziasmega esperantisto.

Unu tagon S-ano Wranka vizitis la urbon *Sao Paulo* kaj en la sidejo de la tiea Klubo li faris interesan kaj sukcesplenan prelegon. Urbego kun ĉirkaŭ 2.000.000 da enloĝantoj, Sao Paulo estas konata kiel la „koro de Brazilo”, ĉar en kaj ĉirkaŭ ĝi staras kelkaj el la plej grandaj industrioj de la tuta lando.

Nia Movado tie estas sufiĉe vigla, kaj post la vizito de S-ano Wranka ĉiuj interesiĝis pri la facila kaj efika metodo de ili ankoraŭ nekonata. Tie S-ano *Oswaldo Leite de Moraes* sin proponis disvastigi la novaĵon.

La vizito de s-ro Wranka al Rio-de-Janeiro kaj aliaj urboj de Brazilo liveris al nia movado netakseblan profiton. Multaj malnovaj samideanoj reaktivigis kaj entuziasmaj novaj mondlingvanoj kreigis, de kies kunlaboro en la estonteco ni povas esperi valoran helpon. La efiko de tia vizito estas mirakla, precipe se la propagandisto estas ne nur sprita desegnisto, sed ankaŭ talenta pedagogo kaj paroladisto.

Nelson Pereira de Souza.



Gesinjoroj Wranka dum ekskurso, antaŭ la fama statuo de Kristo Savinto sur la pinto de la monto Korkovado apud Rio-de-Janeiro, akompanataj de gesinjoroj Moreira, kiuj jus lernis Esperanton en la kurso de s-ro Wranka. — Lu personoj, de dekstre: S-ro Wranka, S-ino Moreira, S-ino Wranka, S-ro Moreira. — S-ro Wranka portas la belan aktujon, kiun liaj gekursanoj donacis al li kiel memorajon.



P-ino Mariuccia Mazza en Bergamo (Italujo), diligenta propagandistino de Esperanto kaj reprezentantino de UL por Italujo, la 16-an de novembro ricevis de la Universitato de Milano la doktoran diplomon pri filologio kaj fremdlingvaj literaturoj. — D-ino Mazza faris siajn universitatajn studojn en Milano kaj en Londono. Ŝi estas bofratino de la nederlanda geologo D-ro H. C. Raasveldt, estrarano de UL, kiu vivas kaj laboras nuntempe en Bogotá, ĉefurbo de la sudamerika respubliko Kolombio.

KION FARAS LA LIGANOJ?

F-ino M. H. Vermaas, estrarano de UL, Rotterdam, la 17-an de novembro faris en la Esperanto-Societo „Merkurio” en Rotterdam paroladon pri: „Travivaĵoj en Islanda Esperantujo”. — La 7-an de novembro ŝi faris paroladon sub la titolo: „Hodiaŭa Islando, la lando kun granda estonteco”, en la urbo Alkmaar, dum kunveno de la nord-holanda propaganda societo „La Norda Stelo”.

S-ro P. A. van Boven, AM de UL en Rotterdam (Nederland), dum la somero faris vojaĝon tra Danujo, kun prelegoj en diversaj urboj. Post sia reveno li faris en la Esperanto-klubo „Merkurio” en Rotterdam paroladon pri sia vojaĝo.

D-ro St. Guĝev, profesoro pri muzikociologio en la ŝtata muzikakademio en Sofio (Bulgario), prezidanto de la Bulgara Esperanto-Asocio, Aktiva Membro de UL, la 29-an de novembro faris grand sukcesan publikan paroladon pri la temo: „La utilo kaj malutilo de la fremdaj lingvoj”.

S-ro O. T. Nicolaisen el Norvegiujo, AM de UL, internacia instruisto de Esperanto, gvidas en Bournemouth 4 kursojn por 110 komencantoj. El tiuj 2 kursoj estas por 60 gepostistoj.

S-ro Y. van der Schaaff, AM de UL en Haarlem (Nederland), informis pri sia intencata edziĝo al f-ino Margaretha B. C. Giltjes.

S-ro Lennart Aberg, sveda reprezentanto de UL, ludas gravan rolon ankaŭ sur la kampo de la sveda popolklerigo. Kiel prezidanto de la loka (Skövde) sekcio de la potenco sveda ABF (= Arbetarnas Bildnings-Förbund = Laborista Kleriga Asocio) li ne nur estras kaj organizas la kursaron en la Studhejmo de Skövde, sed, kiel ni vidas en la ĵus publikigita aŭtuna programo, li

eĉ persone gvidas tri studrondojn: pri la tekniko de organizo kaj gvido de kunvenoj, kaj la aktiva publika paroli, plue pri sveda lingvo kaj lingvo Esperanto-kurso por komencantoj.

S-ro K. P. Sørensen, AM de UL el Odense (Danujo), en la lasta somero faris vojaĝon tra Nederlando kaj vizitis ankaŭ la Centran Oficejon de UL en Hago.

S-ro J. van Wageningen, edukisto en la punlernejo de Amersfoort (Nederland), instruas Esperanton al kelkaj dekaj da knaboj.

S-ro Tone Logar en Ljubljana (Jugoslavio), reprezentanto de UL, dum la somera libertempo gvidis en sia urbo trisemajnan ferian kurson de Esperanto, kun 8 instrueroj ĉiusemajne. El liaj 16 kursanoj 12 faris la ekzamenon. La maksimumo de la atingebaj punktoj en la ekzameno estis 50. La plej bona kursano atingis 47.32 punktojn, do 94.64%-ojn, la plej malbona 37.32 punktojn, do 74.64%-ojn.

S-ro Aleksandro Szalay, reprezentanto de UL por Hungarujo, en sia presejo presis kalkulklipojn kun propaganda teksto por Esperanto kaj disponigas kvantojn de tiuj klipoj al kelneroj, komercistoj k.t.p. Tiel li faras tre efikan propagandon por la mondlingvo.

Prof. Mieczyslaw Sygnarski, lektoro de Esperanto ĉe la Jagiellona Universitato en Krakovo (Polujo), sendis leteron al la usona prezidanto Truman kun propono, ke la organizo de la Unuiĝintaj Nacioj uzu Esperanton. La Amerika Legacio en Varŝavo sciigis lin, ke lia letero atingis la Prezidanton, kaj dankis pro lia laboro por akceli pli bonan internacian interkompreniĝon.

KONGRESA RAKONTO

Ni deziras ĉi tiun jaron kun ririgardo al la plej grava okazintaĵo de la jaro 1948. Por la legantoj de La Praktiko kaj ĝenerale por la tutmonda esperantistaro ĝi estis sendube la 33-a Universala Kongreso de Esperanto en la sveda urbo Malmö. La sveda Esperanto-gazeto „La Espero”, kiu ĵurkuis kiel kongresa gazeto, publikigis pri la kongreso ampleksan raporton, ilustritan per multaj belaj bildoj, kaj bonvolis pruntedoni la klisojn al ni, por ke tiuj kontindaj kaj memorindaj bildoj per La Praktiko atingu la tutmondan esperantistaron kaj precipe tiujn samideanojn, kiuj ne havis la bonŝancon povi partopreni en la kongreso. Tiel la bildoj servos kiel interesaj historiaj dokumentoj, kaj ankaŭ kiel efikaj propagandiloj, ĉar ili pravas la grandecon kaj seriozecon de la Esperanto-movado kaj atestas pri tio, ke per la admirinda kreaĵo de Doktoro Zamenhoj la problemoj de mondlingvo estas perfekte kaj definitive solvita. — Al la bildoj kiel garnajon ni aldonas la sekvantan rakonton, kiu baziĝas sur vera okazintaĵo dum la lastaj universaliaj Esperanto-kongresoj. La nomoj de la geherooj, kompreneble, estas fiktitaj.

Gaje fajfante, la juna svisa inĝeniero Marcel Renard suprenkuris la ŝtuparon al sia fraŭla ĉambro, en la agrabla antaŭvido de libera vespero. Li multe laboris en la lastaj semajnoj kaj li estis feliĉa, ke lia tasko por hodiaŭ finiĝis. Li larĝe malfermis la fenestrajn pordojn kaj eksidis ĉe la tablo, kie jam atendis lia vespermanĝo. Li rapidis por kiel eble plej baldaŭ povi preni sian kutiman lokon sur la balkoneto, de kie li havis admirindan perspektivon al la montaro. Estis varma julia vespero, kaj preninte diversajn gazetojn, kiuj jam delonge restis nelegitaj, li instalas sin sur la balkono. Ha, unue legi La Praktikon! Li ĉiam ĝojis legi la diversajn novaĵojn pri la movado, kaj precipe nun li kun granda intereso legis la programon de la venonta kongreso. Li aliĝis tuj post la antaŭa kongreso, kiam li havis ankoraŭ la freŝan memoron pri ĝi.

— Jes... — momenton li meditis pri la lasta kongreso. Ĝi estis bela, kiom da bonaj amikoj li akiris tie, kaj tre vage, poste pli kaj pli klare li memoris, ke li faris promeson al iu fraŭlino.

— Kio estis, — li pensadis, — kio estis, kion mi promesis, kiu ŝi estis?...

Cerbumante kaj kolektante ĉiujn siajn memorojn, li en unu momento klare memoris, ke li partoprenis la tutagan ekskurson kun iu juna fraŭlino, kaj al tiu li solene

Panorama fotografiaĵo pri la kongresanoj, ĵarita en la sportejo de Malmö. Entute 1761 personoj el 33 landoj estis aliĝintaj al la 33-a Universala Esperanto-Kongreso en Malmö.




Tri personoj, kiuj havis grandan meriton en la organizo kaj glata ĵurkuiĝo de la kongreso en Malmö. De maldekstre: s-ro Jan Ströme, prezidanto de la organiza komitato kaj de la kongreso mem, lia edzino kaj la norveĝa s-ro O. T. Nicolaisen, konstanta kongresa sekretario. Kiel internacia Esperanto-instruisto li ankaŭ gvidis antaŭ la kongreso plurajn Esperanto-kursojn en Malmö, por prepari la loĝantaron de la urbo al la akcepto de la tutmonda gastaro.

promesis renkonti ŝin denove en la sekvanta kongreso, sed li ne memoris plu ŝian nomon, kaj nur vage ŝian vizaĝon. Ke li povis forgesi tion! Li neniam plu skribis al ŝi, sed ankaŭ ŝi ne skribis al li. Li memoris, ke je lia demando pri ŝia adreso, ŝi respondis, ke li povos trovi ĝin en la listo de la kongresanoj. Certe ŝi atendis, ke li unua skribos. Kion fari nun? Li devas rebonigi sian malĝentilajon.

— Mi tuj skribos al ŝi kaj fiksos renkonton por la proksima kongreso. Feliĉe ankoraŭ ne estas tro malfrue!

Li ekstaris por preni paperon, kiam

li rimarkis, ke li forgesis sian nomon. Malpacience li prenis la liston de la kongresintoj. Nederlandano ŝi estis: tion li almenaŭ rememoris, kaj mallauté dirante en si mem la alfabeton, li haltis ĉe la litero „ko”. Lia memoro pli kaj pli klariĝis.



La moderna konstruaĵo de la Urba Teatro de Malmö, kiu servis kiel kongresejo. En ĝi okazis la solena malferma kunsido, la laborkunsidoj kaj la ĝenerala kunsido, kaj en ĝi funkciis la kongresa oficejo. Sur la konstruaĵo en du lokoj estas videbla la surskribo „Esperanto-Kongreso”, kaj en la mezo de la fronto pendas la esperantista flago.



— Jes, certe, ŝia nomo komenciĝis per „ko”.

Li foliumis la paĝojn de la nomlisto kaj haltis ĉe la nomo: Annie Kusters, sed tuj sub ĝi staris alia nomo kun „k”: Lize Kolkman. Kusters, Kolkman, Kolkman, Kusters; antaŭnomon ŝi ne donis tiam, do tio ne povis helpi lin. Fine li decidis, ke ŝia nomo estis Kusters. Kaj li skribis:

„Kara Samideanino, Vi certe miris, ke mi neniam plu skribis al vi, sed mi havas novan oficon, kiu donis al mi multeĝan laboron. Sed nun baldaŭ mi havos liberatempon. Mi esperas renovigian amikecon dum la baldaŭa kongreso. Do, ne koleru pro mia silentado kaj bonvolu indiki al mi daton kaj lokon en la

kongresurbo, kie mi povos renkonti vin. Kun antaŭĝojo revidi vin en la proksima kongreso, mi restas kun sinceraĵ

salutoj, samideane via Marcel Renard. — Ankorau la adreso kaj poŝtmarkoj kaj morgaŭ mi ĵetos la leteron en la lete-

keston. Feliĉe, ke mi en la lasta momento rememorigion, — li pensis, kaj kontente li daŭrigis la legadon de la revuoj.

*


Du tagojn poste Annie Kusters trovis eksterlandan leteron en sia hejma leterkesto, kaj kutimiginte al multaj korespondencoj el eksterlando, ŝi malfermis ĝin kaj legis la enhavon.

— Marcel Renard?? Neniam mi aŭdis ĉi tiun nomon. Kiu li povas esti? Li skribas, kvazaŭ li bone konus min. Ĉu peti klarigon? Ĉu skribi, ke li certe eraras? Sed eble mi efektive renkontis lin en la antaŭa kongreso, kaj kion li devos pensi vidante, ke mi tute forgesis lin! Ne, tio ne iras; verŝajne mi tuj rekonos lin ĉe la revido.

Estis tiom da amikoj tie! Li skribis tiel afable, kaj la ideo, ke ŝi certe faris grandan impreson je li, iom flatis ŝin.

Komprene, ke ĉe la tempo urĝas, ŝi jam en la sama vespero respondis:

„Kara Samideano, Via letero tre ĝojigis min kaj volonte mi renkontos vin.





La egipta kongresano s-ro Nassif Isaac, Aktiva Membro de Universala Ligo, kun svedaj kongresaninoj vestitaj per naciaj kostumoj. Dekstre s-ino Strönne, edzino de la kongresa prezidanto, maldekstre ŝia fratino t-ino Brita Ohlsson.



La senlaca s-ro Lennart Aberg, reprezentanto de Universala Ligo por Svedujo, dum ekskurso instruas kantojn al la ripozantaj kongresanoj.



Ĝi gvidantaj personoj en Universala Esperanto-Asocio, interparolado dum la kongreso. De dekstre: s-ro C. C. Idsmith, ĝen. sekr. de UEA; s-ro E. Malmgren, prez. de UEA; s-ro A. C. Oliver, estrarano de UEA.

Mi loĝos en la hotelo „La Nigra Aglo“, kaj mi atendos vin en la halo, en la unua kongrestago, posttagmeze je la dua horo. Kun koraj salutoj, sincere via Annie Kusters.”

*

En brila, varma tago la kongresanoj amase alvenis en la kongresurbon, kie en la sama vespero okazos la interkonatiĝa vespero. Marcel Renard, matene alveninte, rapide tagmanĝis por esti ĝustatempe en la indikita hotelo. Li donis sian nomkarton al la pordisto kaj petis paroli kun f-ino Kusters. Li vidis, kiel la pordisto eniris en la halon kaj transdonis lian karton. Ŝi tuj ekstaris kaj afable ridetante iris renkonte al li kaj invitis lin eksidi, interne tre konsternite, ĉar ŝi tuj konstatis, ke ŝi neniam antaŭe vidis ĉi tiun viron.

Do, ĉi tiu estas fraŭlino Kusters, — li pensis. — Mi ne estus rekoninta ŝin, sed mi tamen ne povas demandi al ŝi, ĉu estis ŝi, kun kiu mi faris la ekskurson, aŭ ne. Imagu, ke ne estis ŝi! Mi ne povus diri: Pardonu, fraŭlino, mi eraris, mi skribis al la malĝusta persono.

Li devis savi sian honoron kaj li forte esperis, ke tamen ŝi estas la ĝusta, kaj ke li nur malbone memoras pri ŝi.

— Ĉu vi konsentas iom promeni?, — li diris. — Estas tro bela tago por sidi interne. Mi jam konas la urbon, ĉar mi vizitis ĝin antaŭe. Estas ĉarmaj, malgrandaj trinkejoj ekster la urbo, kie oni povas sidi ekstere en la ombro de malnovaj kaŝtanoj.

Dum la promeno al la tramo, kiu portos ilin ekster la urbon, li rigardadis ŝin de flanke kaj li ĉiukaze estis tre kontenta, ke li trovis ŝin. Li ankaŭ plaĉis al ŝi, sed turmentis ŝin la penso, kiel klarigi al li, ke ŝi aŭ ne konis aŭ forgesis lin.

Kiam ili fine sidis trankvile en ĉarma laŭbo kun bongusta glaciaĵo antaŭ si, li riskis komenci:

— Bela kongreso, la antaŭan jaron!

— Jes, tre bela!

— Kaj ĉu vi memoras tiun interesan ekskurson al la lagoj?

Efektive ŝi estis tie, do ŝi kuraĝe respondis:

— Jes, grandioza ĝi estis.

Li ekhavis kuraĝon. Nun li volis havi certecon.

— Mi ne povas kompreni, ke mi estis tia azeno, ke mi ne tuj skribis al vi longan leteron post la kongreso. Mi petas pardonon, ke mi tiel neglektis mian promeson. Ni tiel agrable promenis laŭlonge de la lago kaj malgraŭ la pluvego ni eksidis sur tiun benkon. Viaj belaj ŝuetoj estis




Du kongresaninoj el Ĉeĥoslovakio. Per siaj pentrindaĵ naciaj kostumoj ili donas ne nur koloron kaj ĉarmon al la kongreso, sed ankaŭ praktikan etnografian lecionon al la kongresanoj venintaj el aliaj landoj.



Dum la Esperanto-kongresoj okazas ĉiam ankaŭ diservoj de ta diversaj religioj, kun prediko, kantado k.t.p. en Esperanto. Nia bildo montras la evangelian diservon dum la kongreso en Malmö.

La moderna konstruaĵo de la Urba Teatro de Malmö, kiu servis kiel kongresejo. En ĝi okazis la solena maŝerna kunsido, la laborkunsidoj kaj la ĝerna kunsido, kaj en ĝi funkciis la kongresa oficejo. Sur la konstruaĵo en du lokoj estas videbla la surskribo „Esperanto-Kongreso“, kaj en la mezo de la fronto pendas la esperantista flago.



— Jes, certe, ŝia nomo komenciĝis per „ko“.

Li foliumis la paĝojn de la nomlisto kaj haltis ĉe la nomo: Annie Koters, sed tuj sub ĝi staris alia nomo kun „k“: Lize Kolkman. Koters, Kolkman, Kolkman. Koters; antaŭnomon ŝi ne donis tiam, do tio ne povis helpi lin. Fine li decidis, ke ŝia nomo estis Koters. Kaj li skribis:

„Kara Samideanino, Vi certe miris, ke mi neniam plu skribis al vi, sed mi havas novan oficon, kiu donis al mi multeĝan laboron. Sed nun baldaŭ mi havos liber-tempon. Mi esperas renovigi nian amikecon dum la baldaŭa kongreso. Do, mi koleru pro mia silentado kaj bon-volu indiki al mi daton kaj lokon en la

kongresurbo, kie mi povos renkonti vin. Kun antaŭĝoĵo revidi vin en la proksima kongreso, mi restas kun sinceraj

salutoj, samideane via Marcel Renard. — Ankoraŭ la adreso kaj poŝtmarko kaj morgaŭ mi ĵetos la leteron en la le-

keston. Feliĉe, ke mi en lasta momento rememoro, — li pensis, kaj kontente li daŭrigis la legadon de la revuoj.

*


Du tagojn poste Annie Koters trovis eksterlandan leteron en sia hejma leterkesto, kaj kutimiĝinte al pli trankvilaj kondiĉoj en eksterlando, ŝi malfermis ĝin kaj legis la enhavon.

— Marcel Renard?? Neniam mi aŭdis ĉi tiun nomon. Kiu li povas esti? Li skribas, kvazaŭ li bone konus min. Ĉu peti klarigon? Ĉu skribi, ke li certe eraras? Sed eble mi efektive renkontis lin en la antaŭa kongreso, kaj kion li devos pensi vidante, ke mi tute forgesis lin! Ne, tio ne iras; verŝajne mi tuj rekonos lin ĉe la revido.

Estis tiom da amikoj tie! Li skribis tiel afable, kaj la ideo, ke ŝi certe faris grandan impreson je li, iom flatis ŝin.

Komprenante, ke la tempo urĝas, ŝi jam en la sama vespero respondis:

„Kara Samideano, Via letero tre gojiĝis min kaj volonte mi renkontos vin.





La egipta kongresano s-ro Nassif Isaac, Aktiva Membro de Universala Ligo, kun svedaj kongresaninoj vestitaj per naciaj kostumoj. Dekstre s-ino Strönné, edzino de la kongresa prezidanto, maldekstre sia fratino f-ino Britta Ohlsson.



La senlaca s-ro Lennart Aberg, reprezentanto de Universale Ligo por Svedujo, dum ekskurso instruas kantojn al la ripozantaj kongresanoj.



Tri gvidantaj personoj en Universala Esperanto-Asocio, en interparolado dum la kongreso. De dekstre: s-ro C. C. Goldsmith, ĝen. sekr. de UEA; s-ro E. Malmgren, prez. de UEA; s-ro A. C. Oliver, estrarano de UEA.

Mi loĝos en la hotelo „La Nigra Aglo”, kaj mi atendos vin en la halo, en la unua kongrestago, posttagmeze je la dua horo. Kun koraj salutoj, sincere via Annie Kosters.”

*

En brila, varma tago la kongresanoj amase alvenis en la kongresurbon, kie en la sama vespero okazos la interkonatiga vespero. Marcel Renard, matene alveninte, rapide tagmanĝis por esti ĝustatempe en la indikita hotelo. Li donis sian nomkarton al la pordisto kaj petis paroli kun f-ino Kosters. Li vidis, kiel la pordisto eniris en la halon kaj transdonis lian karton. Ŝi tuj ekstaris kaj afable ridetante iris renkonte al li kaj invitis lin eksidi, interne tre konsternite, ĉar ŝi tuj konstatis, ke ŝi neniam antaŭe vidis ĉi tiun viron.

Do, ĉi tiu estas fraŭlino Kosters, — li pensis. — Mi ne estus rekoninta ŝin, sed mi tamen ne povas demandi al ŝi, ĉu estis ŝi, kun kiu mi faris la ekskurson, aŭ ne. Imagu, ke ne estis ŝi! Mi ne povus diri: Pardonu, fraŭlino, mi eraris, mi skribis al la malĝusta persono.

Li devis savi sian honoron kaj li forte esperis, ke tamen ŝi estas la ĝusta, kaj ke li nur malbone memoras pri ŝi.

— Ĉu vi konsentas iom promeni?, — li diris. — Estas tro bela tago por sidi interne. Mi jam konas la urbon, ĉar mi vizitis ĝin antaŭe. Estas ĉarmaj, malgrandaj trinkejoj ekster la urbo, kie oni povas sidi ekstere en la ombro de malnovaj kaŝtanoj.

Dum la promeno al la tramo, kiu portos ilin ekster la urbon, li rigardadis ŝin de flanke kaj li ĉiukaze estis tre kontenta, ke li trovis ŝin. Li ankaŭ plaĉis al ŝi, sed turmentis ŝin li penso, kiel klarigi al li, ke ŝi aŭ ne konis aŭ forgesis lin.

Kiam ili fine sidis trankvile en ĉarma laŭbo kun bongusta glaciaĵo antaŭ si, li riskis komenci:

— Bela kongreso, la antaŭan jaron!

— Jes, tre bela!

— Kaj ĉu vi memoras tiun interesan ekskurson al la lagoj?

Efektive ŝi estis tie, do ŝi kuraje respondis:

— Jes, grandioza ĝi estis.

Li ekhavis kuraĝon. Nun li volis havi certecon.

— Mi ne povas kompreni, ke mi estis tia azeno, ke mi ne tuj skribis al vi longan leteron post la kongreso. Mi petas pardonon, ke mi tiel neglektis mian promeson. Ni tiel agrable promenis laŭlonge de la lago kaj malgraŭ la pluvego ni eksidis sur tiun benkon. Viaj belaj ŝuetoj estis



Du kongresaninoj el Ĉeĥoslovakio. Per siaj pentrindaĵaj naciaj kostumoj ili donas ne nur koloron kaj ĉarmon al la kongreso, sed ankaŭ praktikan etnografian lecionon al la kongresanoj venintaj el aliaj landoj.



Dum la Esperanto-kongresoj okazas ĉiam ankaŭ diservoj de la diversaj religioj, kun prediĉo, kantado k.t.p. en Esperanto. Nia bildo montras la evangelian diservon dum la kongreso en Malmö.

tute trempitaj, kaj kia stultulo estis tiu longa norvego, kiu bonkore proponis siajn galoŝojn! Ke li ne vidis, ke liaj piedoj estas duoble pli grandaj ol la viaj!


Annite pli kaj pli embarasiĝis. Nun ŝi devis interrompi lin; ŝi volis ekkrii: „silentu, mi ne estas ŝi!“, sed ŝia lango kvazaŭ rigidigis.

— Kaj, — li daŭrigis. . . , sed en la sama momento ili ambaŭ levis la kapon aŭdante grandan bruon de gajaj voĉoj. Granda societo de kongresanoj envenis en la ĝardenon kaj serĉis ombran lokon por eksidi. Subite unu el la fraŭlinoj venis kurante al ilia tableto kaj kvazaŭ kolere direktis sin al Marcel, kiu tuj ekstaris:

— Ha, jen vi estas, mal-fidelulo! Ĉu vi tute forgesis vian promeson, viajn belajn vortojn, viajn. . . sed kio estas al vi? Vi rigardas min kvazaŭ mi estus fantomo. Ĉu vi ne rekonas min? Lize Kolkman; ni kune vizitis la lagojn, ni. . . sed sufiĉas, mi pardonas al vi. Ĝis revido hodiaŭ vespere. Mi ne volas perdi mian societon! Ĝis!!

Li malrapide eksidis. Li vidis, kiel ŝi tute ruĝiĝinte, rigardis antaŭ sin, Kion ŝi devas pensi pri mi? Certe tion, ke mi estas trompisto!

— Kion li devas pensi pri mi? Ke mi estas tute frenezal!



La solena malferma kunveno de la kongreso en la Urba Teatro de Malmö.

— Mi. . . — li komencis, sed ne trovis pliajn vortojn.

— Mi. . . — ŝi diris.

— Ne, mi. . . — diris li denove.

Iliaj okuloj renkontiĝis, kaj subite ili ambaŭ ekridetis.

— Ĉu vi ne koleras al mi? — li fine diris.

— Ĉu vi ne malestimas min? — ŝi respondis.

Kaj post kiam Marcel eldiris tion kaj ŝi klarigis sian sintenon, la amikeco estis sigelita.

Venis la adiaŭa vespero. Silente ili sidis en angulo de la festa ĉambro.

— Ni havis belan semajnon kune, — li diris; — mi tuj skribos al vi.


Ŝi ekridetis.

— Aŭ vi forgesos skribi, kiel en la antaŭa jaro!

Unu momenton li silentis. Tiam li prenis sian manon kaj mallauĉe respondis:

— Neeble, ĉar en la sekvonta jaro ni vizitos la kongreson kiel geedzoj!

Julia Isbrucker.



Al la esperantista historio de la jaro 1948 apartenas ankaŭ la Internacia Junulara Kunveno en la nederlanda urbeto Groet, organizita de la T.J.O. (Tutmonda Junular-Organizo) en la monato aŭgusto. En la sukcesplena kunveno, kiu daŭris sep tagojn, partoprenis pli ol 200 gejunuloj kaj geinstruistoj el sep landoj. Jen bildo pri la partoprenantaro. (Kliŝo de „La Juna Vivo“, sept. 1948.)

Suno-kanto.

Donu, Dio, al mi nun
Iomete de la sun'.
Via suno en ĉielo
Helpu min al mia celo:


El la ombroj logi homojn,
Fari sunaj ties domojn;
Sun' ĝojigas, sun' vivigas,
Suno nin al vi religas!

Trovi gojon en la nuno,
Gvidi homojn al la suno —
Jen ŝlosilo de ĉielo,
Jen de mia vivo celo!

Johano Robertson.

MOMENTON!

malgrandaj bildoj pri grandaj homoj



Grafo De LUC

estis svislanda ambasadoro de la franca reĝo Ludoviko XIV-a. En unu el siaj leteroj, senditaj al sia regnestro, li plende rakontis, ke dum iu diplomata tagmanĝo, kiu daŭris sep tutajn horojn, li devis konsumi terure multan vinon.

„Sed, — li daŭrigis en sia letero, — mi estas ja preta fari ĉion por via moŝto, kvankam, por esti sincera, pli volonte mi preĝas ol drinkas por la sano de via moŝto.”

Victor KONING (1842—1894)

franca verkisto, en sia juna aĝo havis tre intimajn rilatojn kun la tiam jam blankhara eminenta aktorino, sinjorino Déjazet. La maljuna Roqueplan rimarkis tion kaj en unu tago petoleme diris al la junulo:

— Do vi estas la amanto de sinjorino Déjazet?

La juna verkisto embarasiĝis kaj balbutis ion.

— Nu, ne hontu pro tio, — diris Roqueplan serioziĝinte; — ankaŭ mi mem estis sia amanto, kiam mi estis tiel juna, kiel vi.

Blaise DIAGNE (1872—1934)

negra deputito, kiu en la franca parlamento dum jardekoj reprezentis la afrikan Senegalon, edziĝis al franca belulino. Ĉi tiu donacis al sia nigra edzo kelkajn tre belajn infanojn. Diagne mem ofte rakontis la sekvantan gajan epizodon:

„En la jaro 1914 en la zoologia kaj botanika ĝardeno de Parizo iu sovaĝa afrika gento tiris al si la intereson de la publiko per siaj rimarkindaj ekzotikaj produktoj. En unu dimanĉo mia fileto diris al mi:

— Paĉjo, bonvolu porti min hodiaŭ al la bestoĝardeno; mi volas vidi negrojn!”

Papo SIKSTO V-a (1521—1590)

okaze de sia kronado en la jaro 1585 akceptis la gratulantojn venintajn el ĉiuj partoj de la mondo. Inter la gratulantoj estis ankaŭ la juna marŝalo de Kastilio sendita de la hispana reĝo Filipo II-a. La papo estis malkontenta, ke la reĝo sendis tian junan delegiton, kaj diris:

— Ĉu via mastro ne havas sufiĉe da viroj, ke li devis sendi iun sen barbo?

— Se mia mastro estus sciinta, ke la merito estas en la barbo, — respondis la fiera hispano, — li estus sendinta kapron kaj ne homon.

UMBERTO (1844—1900)



itala reĝo, estis unu el la plej pasiaj kaj entuziasmaj fumantoj en la tuta mondo. Kian plezuregon li havis en la fumado, pri tio iam lia edzino, Margareto, jene rakontis al la princo de Kimrujo, la posta angla reĝo Edvardo la VII-a:

— Mia edzo adoras la tabakon, kaj ankaŭ mi mem ŝatas, se la viroj fumas. Multajn mankojn de la viroj mi povas pardoni, sed mi ne povas toleri la virojn, kiuj ne fumas. La vera kavaliro devas ŝati la bonan cigaron. Kiam mia edzo estas en malbona humoro, mi mem portas al li lian preferatan p'pon. Se li estas bonhumora, li ricevas de mi ankaŭ cigaredon. Sed kiam mi vo'as de li iun gravan aferon, mi prezentas al li bonan, del katan cigaron. La pipo konsilas kaj trankviliĝas lin, la cigaredo gaŝgas lin, kaj kiam li tansoniĝas al la ĝuado de vera kuba aŭ havana cigaro, mi povas fari al li la plej aŭlacan d ziron; li certe ne rifuzos plenumi ĝin.

ANTISTHENES (444—356 a. Kr.), la greka filozofo, iam antaŭ siaj disĉiploj eldiris la jenan deklaron:

— La ekzekutisto estas pli bona homo ol la tirano.

— Kial?, — demandis tiam unu el la disĉiploj.

— Ĉar la ekzekutisto mortigas nur la krimulojn, sed la tirano ankaŭ la senkulpulojn, — respondis la filozofo.

John ABERNETHY (1764—1831)

estis angla kuracisto. En iu tago unu el liaj pacientoj demandis al li:

— Ĉu vi pensas, sinjoro doktoro, ke ankaŭ mi povos vivi cent jarojn, kiel mia patro?

— Kiom da jaroj vi havas? — demandis la kuracisto.

— Kvindek-du.

— Ĉu vi trinkas vinon?

— Mi estas antialkoholisto.

— Ĉu vi fumas?

— Neniam en la vivo mi fumis ankoraŭ.

— Ĉu vi kartludadas?

— Tute ne.

— Ĉu vi manĝas multan viandon?

— Mi estas vegetarano.

— Ĉu plaĉas al vi la virinoj?

— Tre malmulte.

— Sed tiam, pardonu min, kial vi deziras vivi cent jarojn?

Don Carlos de BOURBON

(1788—1855)

la hispana tronpretendanto, tre ŝatis sian generalon Dorregeray. Dum la hispana interna milito en 1838 Dorregeray vundiĝis, kaj Don Carlos tiel anoncis al siaj soldatoj la vundiĝon de sia favorato:

— Soldatoj! Femurpafon ricevis ... mia dekstra mano.

ESPERANTO EN LA SCIENCO

Modesta, sed multpromesa sukceso en Nederlando.

Laŭ peto de la faksindikato de dentistoj en Jugoslavio, nia ANSE (Asocio de Nederlandaj Scienculoj Esperantistaj, sekretario: Eekhoornlaan 10 en Bennekom, Nederlando) sukcesis atingi, ke la redakcio de la nederlanda dent-hirurgia gazeto „Tijdschrift voor Tandheekkunde“ (adreso: Jan Luykenstraat 52, Amsterdam) komencis esprimigi Esperanto-lingvajn tradukojn de la titoloj de la precipaj artikoloj en ĉiu kajero, ek de la junio numero. Aldonita redakcia komuniko en Esperanto anoncas, ke al interesiĝantoj la redakcio sendas Esperanto-lingvajn resumojn de la artikoloj.

Ĉi tiu modesta apliko estas nur provo por esplori, ĉu la uzado de Esperanto havas perspektivojn. Tial mi konsilas al la legantoj de La Praktiko, ke ili atentigu siajn dentisto-konatojn pri tiu ebleco akiri sciencajn informojn pere de Esperanto. Ni pruvu, ke pli vasta aplikado de nia lingvo estas motivita!

Ni ne povas tio taksu tian pioniran paŝon de la menciita fakgazeto, kvankam ni devas indulgi pro la h-oj anstataŭantaj la supersignojn kaj por kelkaj preseraroj. Sed la grava fakto estas, ke la semo troviĝas en la tero. Ni kreskigu ĝin, por ke poste la redakcio esprimigu Esperanto-lingvajn resumojn, kaj fine eĉ tutajn artikolojn.

La titoloj troveblaj en la unua kajero estas la sekvantaj: 1) *Paradentozo, gingivohipertrofiio, sangomalsano; kazo el la praktiko.* — 2) *Socia ortodontio.* — 3) *Grandegĉelaj tumoroj en la makzelo.* — 4) *Malantaŭeniĝo de molargrupoj.*

Mi volas atentigi pri tio, ke ĉi tiu fakrevuo donas post ĉiu artikolo kvar resumojn, tre mallongajn, en la nederlanda, franca, angla kaj germana lingvoj. Nia ANSE, kies sekretario mi estas, havas interkonsenton kun la redakcio, laŭ kiu ni prizorgos la preparon de la Esperanto-resumoj. En ĉi tiu laboro ni kalkulas je la helpo de kelkaj nederlandaj dentistoj esperantistaj. Nun ekzistas bela okazo por havigi al Esperanto superecon pro tio, ke ni liveros Esperanto-resumojn pli detalajn kaj pli perfektajn, ol la aliaj lingvoj. Ni klopodos sendi al la petintoj tiel bonajn resumojn, ke eĉ ne-esperantistaj dentistoj dezirus oferi tempon kaj energion por lerni Esperanton kaj tiel povi profiti la enhavon de niaj resumoj!

La resumoj (maŝinskribitaj) de la plej gravaj artikoloj estas jam riceveblaj. Dentistoj petu ilin rekte de la redakcio (*vidu la adreson supre!*), aldonante poŝtan respondkuponon. Nia Asocio urĝe petas, ke nefakuloj ne ĝenu la redakcion per petoj por alsendo.

Plue ANSE kunlaboris, ke en la nova scienca gazeto „Vegetatio“ (redaktoro: Prof d-ro J. Heijmans, Leonardstraat 10, Amsterdam-Z., Nederlando) aperis angla-lingva artikolo pri „Metodo kaj supervido de karakterizado de nederlandaj herbejoj“ kun Esperanto-lingva resumo, entute ok paĝoj.

G. F. Makkink.

VARBU NOVAJN MEMBROJN

al la Universala Ligo!

La Estraro de la Universala Ligo turnas sin al ĉiu leganto de La Praktiko kun-la insista peto:

aliĝu al la Universala Ligo kaj varbu novajn membrojn,

por ke la Ligo povu pli rapide kaj pli efike plenumi sian belan kaj utilan taskon: per la komuna lingvo krei novan, tutmondan popolon, kiu formos iam la bazon de la tutmonda ŝtato, floranta patrujo de feliĉa homaro.

La postulo de UL estas tre modesta:

a) Deklaru vian aprobĉon al la celo kaj principoj de la Ligo, per subskribo de la aliĝa deklaracio;

b) Donacu almenaŭ unu brikon por la konstruado de la nova mondo.

Ĉi tie vi vidas la aliĝan „Deklaracion“. Se vi ankoraŭ ne estas membro de UL, uzu ĝin por via propra aliĝo. Se vi jam estas UL-ano, uzu ĝin por varbi novan membron. Sur la dorso de la „Deklaracio“ vi trovas informojn pri UL kaj pri la aliĝo. Se vi intencas varbi pluajn membrojn, petu de la Centra Oficejo de UL aŭ de la landaj reprezentantoj pluajn formularojn, aŭ kopiojn ĉi tiun Deklaracion per maŝino (prefere!), aŭ per mano.

La kotizojn bonvolu pagi al la landaj reprezentantoj, en Nederlando rekte al la Centra Oficejo de UL. (1 Stelo = —25 ned. guld.)

La varbantoj estas premiataj per „premio-kuponoj“. Por ĉiu deko da enpagitaj Steloj estas sendata unu premio-kupono, valoranta 1.— Stelon. La kuponoj estas uzeblaj kiel mono por ĉiuspecaj pagoj.

Ne diru, ke varbi novan membron estas malfacile. Jen, por pruvo kaj ekzemplo, listeto de niaj plej diligentaj varbantoj:

S-ro J. MOLL en Utrecht, Nederlando	varbis 774	membrojn
S-ro S. de JONG en Rotterdam, Nederlando	281	„
S-ro P. L. WRIGHT en Londono, Anglujo	175	„
S-ro G. H. KOUDELS en Utrecht, Nederlando	169	„
S-ro L. van MUNSTER en Hago, Nederlando	168	„
S-ro A. R. CAMPBELL en Belfast, Nord-Irlando	166	„
S-ino J. ISBRUCKER en Hago, Nederlando	163	„
P-ino M. H. VERMAAS en Rotterdam, Nederlando	160	„
S-ro Paul EMBRING en Alingsås, Svedujo	115	„
S-ro John P. ROBERTSON en Zürich, Svislando	110	„
S-ro Andreo CSERI en Hago, Nederlando	98	„
S-ro Russell SCOTT en Letchworth, Anglujo	78	„
S-ro prof. M. SYGNARSKI en Krakovo, Polujo	78	„
S-ro J. de SALDANHA CARREIRA, Lisbono, Portugio	75	„
S-ro André LABIT en Tourcoing, Francujo	72	„
S-ro C. GRAVERSEN en Esbjerg, Danujo	66	„
S-ro Aleksandro SZALAY en Budapest, Hungarujo	65	„
S-ro J. J. W. van GOCH en Hago, Nederlando	58	„
S-ro A. BLAAUWBROEK en Hago, Nederlando	55	„
S-ro José M. DURAN en Buenos Aires, Argentino	55	„
S-ro E. FLAGGEMARS en Amsterdam, Nederlando	52	„
S-ro Lennart ABERG en Skövde, Svedujo	51	„

Ĉi tiuj 22 personoj varbis kune 3084 membrojn. Kion ili povis fari, tion certe ankaŭ vi povos! Kial ne?

Ne per miraklo realiĝos niaj belaj idealoj, sed per nia energia laboro.

Landaj Representantoj de UL:

(post la adreso estas indikita la rondigita valoro de unu Stelo en la landa mono; ĉie la indiko mankas, oni petu informon de la reprezentanto.)

Argentino. — S-ro José M. DURAN, Casilla de Correo 1802, Buenos Aires. — (1 Stelo = —40 pes.)
Aŭstralio. — S-ro Paul E. SCHWERIN, 36 McDougall Street, Milsons Point, N.S.W. — (1 Stelo = 7½ pencoj.)
Aŭstrio. — S-ro Hans STEINER, Grattenbrücke 2, Kirchbichl, Tirol. — Poŝtkonto: 19436. — (1 Stelo = 1 ŝil.)
Belgiujo. — S-ino H. ROOSE-Dekekersgieter, J. & M. Sabbestraat 36, Brugge. — Poŝtkonto 479170. — (1 Stelo = 4.50 br. fr.)
Brazilo. — S-ro Nelson de SOUZA, Caixa Postal 5117, Rio-de-Janeiro. — (1 Stelo = 2.— kruz.)
Britujo. — S-ro P. L. WRIGHT, 5 Hoppers Road, London N 13. — (1 Stelo = 6 pencoj.)
Bulgarujo. — S-ro Dimitr IVANOV, Niš 4, Ruse. — (1 Stelo = 25 levoj.)
Ĉeĥoslovakio. — S-ro Dolfa BARTOŠIK, Na černém vrchu 31, Praha XVI. — (1 Stelo = 5 ĉ. kr.)
Danujo. — S-ro C. GRAVERSEN, Borgergade 48, Esbjerg. — Poŝtkonto: 36375. — (1 Stelo = —50 d. kr.)
Egiptujo. — S-ro Tadors MEGALL, P.B. 1914, Kajro. — (1 Stelo = 25 milimoj.)
Finnlando. — S-ro Vilho SETÄLÄ, Onnentie 23, Helsinki-Kä. — Poŝtkonto 6564. — (1 Stelo = 15 f. markoj.)
Francujo. — S-ro André LABIT, 94 rue de La Rochelle, Tourcoing, Nord. — C. C. P. Lille 1709—29. — (1 Stelo = 25 fr. fr.)

DEKLARACIO

Mi aprobas la celon, principojn kaj laborplanon de la Universala Ligo kaj deziras aliĝi kiel:

Membro, donacante brikojn unufoje por ĉiam.

Fundamenta Membro, donacante brikojn.
(La minimumo estas 500 brikoj.)

Aktiva Membro, donacante brikojn kaj
pagante 24.— Stelojn por la jaro:

Dumviva Aktiva Membro, donacante
brikojn kaj pagante 500.— Stelojn.

S-ro
Nomo: S-ino
F-ino

Profesio:

Plena adreso:

Dato de naskiĝo:

Loko „ „ :

Ĉu Esperanton parolas, komprenas aŭ lernas?

Ĉu volas varbi novajn membrojn?

Dato kaj subskribo:

Varbinto: Membro N-ro

Ĉi tie eltranĉu!

Germanujo. — F-ino Elise JACOBS, Mathildenstrasse 9, Flensburg, Schl.-Holst., Brita zono. — (1 Stelo = —35 g. m.)

Grekujo. — D-ro Anakreon STAMATIADIS, Rodou 23, Athinaí 8.

Hispanujo. — S-ro Delfi DALMAU, Lauria 98, Barcelona. — (1 Stelo = 1.50 pes.)

Hungarujo. — S-ro Aleksandro SZALAY, Esperanto-u. 39, Budapest VIII. — Poŝtkonto 18579. — (1 Stelo = 1.10 for.)

Indonezio. — S-ro A. C. van INGEN, Sabang, Poeloe Weh. — (1 Stelo = —25 guld.)

Italujo. — F-ino D-rino M. MAZZA, Via Tassis 22, Bergamo. — (1 Stelo = 33 liroj.)

Jugoslavio. — S-ro Tone LOGAR, Sv. Petra c. 38, Ljubljana. — Poŝtkonto 6-90602-3 de Slovena Esp-ista Ligo, Ljubljana. — (1 Stelo = 5 din.)

Kanaria Insularo. — S-ro Juan REGULO PEREZ, Cabrera Pinto 30, La Laguna, Tenerife. — (1 Stelo = 1.50 pes.)

Maroko. — S-ro Louis APCHER, Boulevard Ras Aguil, Meknès. — Poŝtkonto: Rabat 40-71. — (1 Stelo = 25 fr. fr.)

Nederlando. — Oni pagu rekte al la Centra Oficejo de UL, Riouwstraat 172, Den Haag. — Poŝtkonto 408826. — (1 Stelo = —25 ned. guld.)

Nord-Irlando. — S-ro A. R. CAMPBELL, 15 Delhi Street, Belfast. — (1 Stelo = 6 pencoj.)

Norvegiujo. — S-ro H. A. ROSBACH, Røros. — (1 Stelo = —.50 n. kr.)

Palestino. — S-ro P. LACHOVITZKY, Kerem Quar., Jerusalem.

Polujo. — Prof. M. SYGNARSKI, Sloneczna 4 m. 23. — (1 St. = 38 zł.)

Portugalujo. — S-ro J. de SALDANHA CARREIRA, Avenida de Graó Vasco 33 r/c, Benfica-Lisboa. — (1 Stelo = 2.50 esk.)

Sud-Afriko. — D-ro S. LIEBECK, P.O. Box 2721, Cape Town. — (1 Stelo = 6 pencoj.)

Svedujo. — S-ro Lennart ABERG, Box 16, Skövde. — Poŝtkonto 33 23 31. — (1 Stelo = —35 sv. kr.)

Svislando. — S-ino Luise RIEDLE, Girhaldenweg 1, Zürich 48. — Poŝtkonto VIII. 29081. — (1 Stelo = —45 sv. fr.)

Urugvajujo. — D-ro R. ZEBALLOS MORALES, Fray Marcos, Florida. — (1 Stelo = —20 pes.)

Usono. — S-ro G. Alan CONNOR, 114 West 16 Street, New York 11, N.Y. — (1 Stelo = —10 dol.)

UNIVERSALA LIGO

La celo de la Universala Ligo estas: akceli la unuiĝon de la popoloj por la sekurigo de la mondpaĉo, en tutmonda federacio demokrate organizita laŭ la principoj de persona libereco, nacia egalrajteco, socia justeco, ĝenerala klerigo, organizita mondekonomio kaj solidareca kunlaboro.

La speciala tasko de la Universala Ligo estas la kreado kaj edukado de tuthomara socio kunligita de komunaj idealoj kaj komuna kulturo. Ĉi tiun taskon la Ligo plenumos funkciigante ampleksan sistemon de internacia amikiĝo, interrilatado kaj kunlaborado, per la kreado de praktikaj servoj plifaciligantaj la internacian interrilatadon, k.t.p.

La oficiala lingvo de la Ligo estas Esperanto. La agado de la Ligo ne estas politika, sed kultura, eduka kaj praktike realiga.

Membro de la Universala Ligo povas esti ĉiu, kiu subskribas la aliĝan deklaron kaj donacas unufoje por ĉiam laŭvolan nombron da simbolaj brikoj. **Fundamenta Membro** estas tiu, kiu donacas minimume 500 brikojn. La valoro de unu briko estas 1.— Stelo (= —25 ned. guld.). Pluaj brikoj estas kiam ajn aldoneblaj.

Aktivaj Membroj estas tiuj, kiuj krom la donaco de brikoj pagas ankaŭ jaran kotizon de 24.— Steloj. Ili ricevas la gazeton kaj almanakon de la Ligo kaj ĝuas diversajn favorojn. La aktiva membreco ne devigas al ia laboro, kaj ĝi estas kiam ajn ĉesigebla kaj poste rekomencebla. La kotizo de **Dumviva Aktiva Membro** estas 500.— Steloj.

CENTRA OFICEJO

DE LA UNIVERSALA LIGO

Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando.

Nederlanda poŝtkonto: 408826.

EL LETEROJ DE NIAJ LEGANTOJ

„Mi kore dankas pro viaj ĝojigaj raportoj kaj gratulas ĉiujn esperantistojn, ĉar ili dank' al via senlaca laboro povas aboni kaj legi la bonegan *La Praktikon*.” — (S-ro H. P. en L., Svedujo.)

„La konkursoj de *La Praktiko* estas vere por ĉiuj gustoj. Brave! — (S-ro A. A. en R., Francujo.)

„Mi ricevis la unuan numeron de *La Praktiko*. Mi havas bondeziron: Estu ĉiu numero ĉiam tiel interesa.” — (S-ro L. G. en C., Francujo.)

„Mi kaptas la okazon gratuli vin pro la bonega gazeto. Ĝia enhavo estas multe varia kaj tre leginda. Laŭ mia opinio ĝi niel povas esti pli bonigata.” — (S-ro O. J. en H., Svedujo.)

„*La Praktiko* estas la plej bona Esperanta gazeto, kiun mi legis ĝis nun. Daŭrigu la bonan laboron!” — (S-ro R. Th. L. en B., Anglujo.)

„Mi gratulas vin pro la reapero de via leginda kaj riĉenhava gazeto. Ĝi estas granda honoro por nia movado.” — (S-ro A. Z. en P. A., Brazilo.)

„Miaj esperoj realiĝis hieraŭ! Nun vi demandas: kiuj esperoj? Jen klarigo: Jam de longe mi serĉas ligan aŭ organizaĵon, similan al la via. Bonŝance angla amikino mia sendis al mi la unuan postmilitan numeron de *La Praktiko*. Tuj la grandeco, la bela aspekto, la desegnaĵoj kaj bildoj, kaj ankaŭ altaj kvalitoj kaptis mian intereson. Mi do sidigis kaj tralegis la bonegan gazeton. Kian mirinde bonan, amuzan, instruigan gazeton mi legis! La Universala Ligo estas ideala ligo. Ĝiaj celoj, organizaj principoj k.t.p. estas indaj por la universaleco de la ligo. Ne estas multaj esperantistoj ĉi tie, sed mi havas multajn gekorespondantojn en diversaj partoj de la mondo. Kaj vi povas esti certa, ke mi anigos ilin. La ligo estas inda por subteni ne nur por la esperantistaro, sed por ĉiu, kiu deziras la realan pacon en la mondo. Kaj en la nuna stato de la mondo la paco estas la sola solvo de la multaj malbonaĵoj k.t.p. La paco per la laboro de UL estos facile havebla.” — (S-ro Ph. O. en O., Nigero, Brita Okcident-Afriko.)

„Mi tute sincere subtenas ĉiujn skribantojn de leterletiraĵoj, kiujn vi publikigas en *La Praktiko*, priskribantaj kaj laŭdantaj la fundamentan ideon, celojn, principojn k.t.p. de nia Ligo. Vere, mi estas ĥerega aparteni al ĝi.” — (S-ro F. W. en K., Sud-Afriko.)

La plej populara libro-serio:



Interesa enhavo!

Modela lingvo!

Malalta prezo!

Unu numero: 1.— Stelo.

Dek numeroj (laŭ elekto): 9.— Steloj.

Atrankita sendo.

Rabato de 10% al la Aktivaj Membroj de UL ĉe antaŭpago.

ATENTU! — La n-roj 19 kaj 23 estas elĉerpitaj. Tial la kompleta serio nun konsistas el nur 31 numeroj (27 libretoj).

- N-ro 1. *Legolibreto*. Trad. kaj orig. De J. Borel.
- N-ro 2. *Fabeloj de Andersen*. El la dana trad. Fr. Skeel-Gjöring.
- N-ro 3. *Bona sinjorino*. Novelo de E. Orzeszko. El pola trad. Kabe.
- N-ro 4. *Rusaj rakontoj, Fabeloj al Helenjo*. De Mamin Sibirjak. El la rusa trad. N. Kabanov.
- N-ro 5. *Don Kihoto de la Manĉo en Barcelono*. De Cervantes. Kvin ĉapitroj de la mondfama verko. Trad. Fr. Pujulà y Vallès.
- N-ro 6. *El la Biblio*. Elektitaj ĉapitroj el la Psalmaro, Sentencoj de Salomono kaj Predikanto. Trad. D-ro L. Zamenhof.
- N-ro 7. *El dramoj*. Fragmentoj el „Ifigenio en Taurido” de Goethe kaj „La rabistoj” de Schiller. Trad. D-ro Zamenhof.
- N-ro 8. *El komedioj*. Fragmentoj el „La revizoro” de Gogol kaj el „Georgo Dandin” de Molière. Trad. D-ro Zamenhof.
- N-ro 9. *Praktika frazaro*. Dialogoj el la ĉiutaga vivo. Verkis J. Borel.
- N-ro 10—11. *Japanaj rakontoj*. El la japana lingvo tradukis Ĉif Toŝio k. a. (*Du numeroj, duobla prezo.*)
- N-ro 12. *Amoro kaj Psiĥe*. De Lucius Apuleius. Trad. el latina.
- N-ro 13. *Bulgaraj rakontoj*. De I. M. Vazov. Trad. A. D. Atanasov.
- N-ro 14—15. *Reaperantoj*. Familia dramato de Henrik Ibsen. El la norvega lingvo trad. O. Binemann. (*Du numeroj, duobla prezo.*)
- N-ro 16. *Komerca korespondo*. (Frazaro.) De J. Borel.
- N-ro 17. *Konsilij pri higieno*. De R. Stolle. Tradukis J. Borel.
- N-ro 18. *La reĝo de la Ora Rivero aŭ la Nigraj Fratoj*. De John Ruskin. El la angla trad. Ivy Kellermann.
- N-ro 20. *La lasta usonano*. Fragmento el „La taglibro de Kan-Li, princo de Dim-Ju-Ĉur kaj admiralo en la persa maristaro”. Verkis J. A. Mitchell. El la angla trad. L. Wendell.
- N-ro 21. *Hungaraj rakontoj*. De F. Herczeg. Trad. A. Panajott.
- N-ro 22. *Nord-germanaj rakontoj*. De H. Bandlow. Tr. E. Scheerpeltz.
- N-ro 24. *La Instituto Milner*. De Jean Jullien. Trad. el franca lingvo.
- N-ro 25. *Novletoj el la Nigra Arbaro*. De Helene Christaller.
- N-ro 26. *La intervidiĝo kaj Nekoniita dialogo*. De Alfred de Vigny. El la franca tradukis J. Borel.
- N-ro 27. *La patrino*. De Ernst Zahn. El la germ. trad. J. Smid.
- N-ro 28. *Elzasaj legendoj*. El la germ. trad. Charlotte Pulvers.
- N-ro 29—31. *Sub la neĝo*. Taglibro de juna loĝanto en la Jura-montaro. Verko kronita de la Franca Akademio, De J. J. Porchat. El la franca trad. J. Borel. (*Tri numeroj, triobla prezo.*)
- N-ro 32. *La am-konkurantoj*. Triakta komedio de R. Schmidt.
- N-ro 33. *La regado de si mem per konscia aŭtosugesto*. De E. Coué. El la franca trad. S. Mayer.

Vendataj ĉe la

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO

Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

Poŝtkonto 162626.

Jarkolekto 1946 de LA PRAKTIKO

estas aĉetebla ĉe la Centra Oficejo de Universala Ligo.

Prezo 12.— Steloj.

Kompletigu vian Praktiko-kolekton per la mainovaj jarkolektoj!

la mondo ridas

Trafa respondo.

Instruisto: Vi devas honti, Friĉjo! Kiam generalo Eisenhower estis en via aĝo, li estis la plej bona lernanto en sia klaso.

Friĉjo: Povas esti, sinjoro, sed kiam li estis en via aĝo, li jam estis generalo!

(College Life.)

Malafabla propono.

Sinjorino al almuzulo: Kaj ĉu oni neniam proponis al vi laboron?

— Nur unufoje, sinjorino, sed plej ofte mi renkontis nur afablecon.

(Ric et Rac.)

Senpena metodo.

Peĉjo: Kiam mi estos granda, mi forte laboros por gajni multan monon.

Joĉjo: Por kio vi bezonos la multan monon?

Peĉjo: Mi volas travojaĝi la tutan mondon!

Joĉjo: Ĉu vi estas freneza, Peĉjo? Fari tiom da penoj! Fariĝu ministro de eksterlandaj aferoj!

(London Opinion.)

La konsolo.

— Ĉu vi legis, — diras la juna aktorino al sia direktoro, — kion skribis pri mi tiu azena kritikisto?

— Ne pensu plu pri ĝi, — konsolas ŝin la direktoro; — tiu kritikisto estas vera papago. Li ĉiam nur ripetas tion, kion la tuta mondo diras.

(Le Rite.)

Fidinda pesilo.

Juna edzino: Hodiaŭ mi peisis la bebon. Ĝi pezas dudektri kilogramojn!

Edzo: Dudek-tri kilogramoj?? Sur kiu pesilo vi peisis ĝin?

Ŝi: Sur tiu sama, sur kiu vi ĉiam pezas la fiŝojn, kiujn vi kaptis.

(The Humorist.)

Modela ĝentileco.

Du malamikoj renkontas sin sur mallarĝa trotuaro. La unua diras:

— Mi ne flankeniras por fripono!

— Tiam mi faras tion! — respondas ĝentile la dua.

(New Humorist.)

Arba parolo.

Unu sentimentala sinjorino faris ekskurson kun aliaj turistoj al granda arbaro. Ŝi haltis antaŭ giganta, maljuna arbo.

— Ho, vi, fiera kverko, — ŝi ĝemis, — se vi povus paroli, kion vi dirus al mi?

— Tre simple, — diris la arbaristo, — ĝi dirus: „Pardonu, sinjorino, mi estas ulmo.”

(Nebelspalter.)

La kvar elementoj.

Instruisto: Joĉjo, kiuj estas la kvar elementoj?

Joĉjo: Akvo, tero, aero kaj... kaj...

Instruisto: Nu, mi helpos vin, Joĉjo! Pripensu nur, kio kaŭzas la plej multajn katastrofojn?

Joĉjo: Ho jes, sinjoro,... la aŭtoj!

(Weekend.)

Verdiraj profesioj.

Advokato al atestanto: Kiom vi ricevos por rakonti ĉi tie nur mensogojn?

Atestanto: Certe ne tiom, krom vi!

(Haagsche Post.)

Klera tempkalkulo.

Antikvajisto: Ĉi tiu vazo estas de antaŭ trimil jaroj.

Sinjorino: Min vi ne povas trompi, sinjoro! Ni ja vivas ankoraŭ nur en la 1948-a jaro!

(Saturday Evening Post.)

Labormoralo.

Instruisto: Nu, Vilĉjo, kiom da homoj laboras en la butikoj de via patro?

Vilĉjo: Kune kun mia patro ok, sinjoro.

Instruisto: Bone, Vilĉjo! Kaj kiom da homoj laboras tie, kiam via patro ne estas en la butikoj?

Vilĉjo: Neniom, sinjoro!

(Men Only.)

Telefonparolo.

— Sinjoro doktoro, ĉu vi povas veni baldaŭ, ĉar mia fileto englutis mian fontplumon?

— Jes, jes, mi venos kiel eble plej baldaŭ. Sed vi devos ion fari intertempe. Aŭskultu:

— Ho, ne tiel gravas, sinjoro doktoro. Intertempe mi uzos krajonon.

(Buen Humor.)


MONDFEDERALISTA MANIFESTACIO EN HAGO

La 12-an de novembro okazis en la nederlanda rezidencita urbo Hagoo granda manifestacio de mondfederalistoj. La hagoa sekcio de la *Nederlanda Mondfederalista Movado* organizis vesperan kunvenon en la granda salono de la Zoologia Gardeno. Partoprenis pli ol 1500 personoj.


Sur la podio, ornamita per la flagoj de diversaj landoj, eminentaj oratoroj pledis por mondfederacio kun mondparlamento kaj mondregistro. Unue pastro *Paulussen* el romkatolika vidpunkto klarigis la problemojn, poste parolis la protestanta pastro *s-ro Aalders*. La konata ĉefflugisto de la K.L.M., *s-ro A. Viruly* (kies verketo „Por la honoro de nia lando” antaŭ la milito aperis ankaŭ en Esperanto-lingva eldono) en sprita maniero pritraktis la temon el la vidpunkto de internacia flugisto, por kiu la senlandlima mondo estas jam realaĵo. La lastan paroladon faris *s-ro P. Kremers*, prezidanto de la *Nederlanda Mondfederalista Movado*. Konata kanthoro zorgis pri la kreo de festa sfero.

La grandsukcesan kunvenon prezidis *s-ino Julia Isbrucker*, vicprezidantino de *Universala Ligo*.

La *Nederlanda Mondfederalista Movado* (*Wereld Federalisten Beweging*), membro de la „*Mondmovado por Federacia Mondregistro*”, havas sian sekretarian oficejon en Amsterdamo (Amstel 24). Ĝia bonege redaktata organo „*De Wereldfederalist*” aperas en ĉiu dua sabato.



La flagornamita podio dum la mondfederalista manifestacio en Hagoo.



Korajn bondezirojn por la nova jaro sendas la redakcio kaj administracio de La Praktiko al ĉiuj siaj ŝatataj legantoj.

Naskiĝo. — Al ges-roj Stein-Isbrucker en Woensdrecht (Nederlando) la 30-an de novembro naskiĝis filineto: Ingrid. Olga.

Al ges-roj Frances kaj David Mac Gill en Wellington (Nov-Zelando), ambaŭ fervoraj esperantistoj kaj membroj de ULL, la 5-an de oktobro naskiĝis fileto nomata Stephen Clive. La gepatroj intencas, ke li estu denaska esperantisto, kaj ili jam faris kelkajn aranĝojn por tio.

Morto. — La 6-an de novembro mortis en Rotterdam (Nederlando) s-ro H. J. Beeke, edzo de s-ino J. C. Beeke-Zwart AM de ULL.

La 21-an de novembro mortis en Wassenaar apud Hago s-ro H. J. Ph. Kramer en la aĝo de 70 jaroj. Li estis tre fervora kaj serioza esperantisto, Aktiva Membro de ULL kaj abonanto de La Praktiko de la komenco.

Antaŭkongreso en Londono. — La Londona Esperanto-Klubo decidis aranĝi antaŭkongreson en Londono, antaŭ la venontjara 34-a Universala Esperanto-Kongreso, okazonta en Bournemouth. La organiza komitato, kies sekretario estas s-ro J. W. Leslie (50 Hillfield Park, London N10), kun granda entuziasmo komencis la preparajn laborojn, por ĉiurilate kontentigi la multnacion partoprenontaron.

Esperanto en la aŭstria radio. — La radiostacio de la aŭstria ĉefurbo Vieno, kiu dum la pasinta somero elsendis en Esperanto ĉiun merkredon matene dum 10 minutoj, ŝanĝis sian programon kaj de oktobro disaŭdigas Esperanto-lingvan programon ĉiun jaudon vespere de la 18,45 ĝis 19,00 h. (MET) per la sendilo Wien II sur meza ondo 228.6 m. kaj sur la mallongaj ondoj 31.05 kaj 41.81 m. En tiu tempo okazas reĝule Esperanto-kurseto por germanlingvanoj kaj poste dum 5 aŭ

10 minutoj informoj en Esperanto por la eksterlando, parte pri interesajoj el Aŭstrio, parte pri la aŭstria Esperanto-movado. La esperantistaro de la diversaj landoj estas petata skribi al la aŭstria radio (adreso: „Radio-Wien“, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrio) pri akcepto aŭ programdeziroj, kaj per tio subteni la klopodojn de la Aŭstria Esperantista Federacio ĉe la radiostacio.

Granda intereso pri Esperanto en Bournemouth. — La preparlaboroj por la 34-a Universala Esperanto-Kongreso en Bournemouth (Anglujo) jam atingis bonajn rezultojn. Interalie estas vigla kursgvidado. Okazas nuntempe 15 kursoj kun 250 partoprenantoj. La plej multaj kursoj estas senpagaj por la lernantoj, ĉar la oficiala edukado pagas la koston de la instruistoj kaj kursejoj. La norvega esperantisto, s-ro O. T. Nicolaisen, AM de ULL, gvidas 4 ĉe-metodajn kursojn por 110 komencantoj. Inter tiuj estas 2 kursoj por 60 gepostistoj.

Bulgario. — La esperantistaro de la havena urbo Ruse ĉe la Danubo en la monato novembro aranĝis verdan varbsemajnon. Ĝi finiĝis bonsukcese kaj brile per la publika prelego de profesoro St. Guĝev, prezidanto de Bulg. Esp. Asocio, pri la temo: „La utilo kaj malutilo de la fremdaj lingvoj“, la 29-an de nov. La rezultato estis nova Esperanto-kurso kun 50 partoprenantoj. La kursgvidanto estas s-ro Vladimir Georgiev. — La nunjara Bulgara Esperanto-Kongreso okazis en la mezo de aŭgusto en la urbo Jambol. Al la kongreso aliĝis 120 personoj, elektive partoprenis 70. En la kongreso la bulgara delegitaro, partopreninta en la Universala Esperanto-Kongreso en Malmö, faris bonimpresan raporton. La venontjara bulgara kongreso okazos en la urbo Vraca.

Egiptujo. — La estraro de la Egipta Esperanto-Asocio sendis al la ministerioj de Sociaj Aferoj kaj Edukado raporton pri la Universala Esperanto-Kongreso en Malmö kaj esprimis la esperon, ke tia kongreso povos okazi ankaŭ en Egiptujo, ĉar la lardo de la piramidoj estas sendube tre vizitinda loko. — La eldono de araba Esp-rantolernolibro, verkita de s-ro Musa Helmi, estas en preparo. — Laŭ la invito de la klubo de „Mossassat El-Shark“ en Kajro, s-ro Musa Helmi, vicprezidanto de la Egipta Esperanto-Asocio, faris interesan paroladon pri la utilo de Esperanto por la egipta popolo. La publiko ĝuis la paroladon

kaj montris emon eklerni Esperanton. — La Egipta Esperanto-Asocio eldonas monatan multobligitan informilon sub la titolo „La Egipta Esperantisto“. La adreso de la redakcio: Postkesto 450, Kajro. — Post la Universala Esperanto-Kongreso en Malmö, kelkaj estraranoj de la Egipta Esperanto-Asocio vizitis la Svedan Legacion en Kajro por esprimi dankon por la afabla akcepto, kiun la egipta kongresa delegito ĝuis en la rondo de la sveda popolo. Oni aparte dankis pro tio, ke la Sveda Legacio per sia interveno ebligis al la egipta delegito akiri la necesan elvirizon. La dankleteron oni prezentis en origita mapo de Svedujo.

Nederlando. — La 'Tramista Esperanto-Grupo „Nia Idealo“ en Rotterdam aranĝis Esperanto-kurson por komencantoj. Partoprenas en ĝi 25 personoj. — En la Esp-ista societo „Mercurio“ en Rotterdam la 8-an de sept. s-ro S. Pragano paroladis pri „Johano la Brava“, majstroverko de la hungara poeto Aleksandro Petöfi, tradukita de D-ro Kalocsay. En la kunveno la 22-an de sept. f-ino Pekelaar raportis pri sia somera restado en Helsingör, f-ino Maasbommel pri la kongreso en Malmö kaj f-ino Vermaas pri la dumkongresaj kunvenoj de UEA. La 6-an de okt. s-ro van Boven parolis pri sia feria vojaĝo tra Danujo. La 20-an de okt. okazis speciala kunveno en la salono „Rotondo“ de la Borso kun programo „Per flugiloj de l' kanto tra la mondo“ de s-ro S. K. Nielsen el Danujo.

Usono. — La „Oregon Stata Sistemo pri Pl-Alta Edukado“ anoncas korespondan kurson pri Esperanto, kiu estas preparita de s-ro John M. Clifford. La uzata lernolibro estas: „Esperanto, the World Interlanguage“ (Esperanto, la Monda Interlingvo) de G. Alan Connor, sekretario de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, en Novjorko.

Esperantista Komercia Ĉambro estis fondata la 15-an de majo, en eksterordinara ĝenerala kunveno de la franca societo „Esperanto kaj Komercio“, en Parizo. Ĝi klopodas kolekti en si ĉiujn esperantistajn komercistojn kaj organizi ilian fakkan kunlaboron, plue disvastigi la uzadon de Esperanto en la komercaj kaj industriaj sferoj. La gvidanto de la sekretariejo estas s-ro Richard Levin, faktestro de propagando ĉe la Foiro de Lyon. Lia adreso: 55 avenue Félix-Faure, Lyon, Francujo.



Legu la konkursajn regulojn en la januara numero!

340-a konkurso.

HISTORIA EKZAMENO

Laŭ la atesto de la historio la popoloj kutimas flati siajn estrojn per diversaj alnomoj. Divenu, kiuj regnestroj ricevis de siaj fidelaj kaj obeemaj subuloj la ĉi tie sekvantajn 14 alnomojn:

- | | |
|-------------------|------------------|
| 1. La bela. | 8. La pia. |
| 2. La konkeranto. | 9. La ruĝbarba. |
| 3. La ŝaga. | 10. La suna. |
| 4. La leonkora. | 11. La kalva. |
| 5. La dika. | 12. La senlanda. |
| 6. La silentema. | 13. La birdisto. |
| 7. La terura. | 14. La mallonga. |

La solvintoj ricevos premi-poentojn laŭ la nombro de la ĝustaj respondoj. Ni akceptos la solvojn ĝis la 15-a de majo. Ne pre plenumi la konkursajn kondiĉojn!

341-a konkurso.

NOMBRA ENIGMO.

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 75 literoj.

- 6, 10, 23, 37, 9, 11, 54, 32, 15, 49, 17, 12, 27 = internacia poŝta pagileto.
- 25, 26, 4, 21, 51, 50, 24, 1, 2, 7, 61, 62, 64, 31 = grava tutmonda organizaĵo.
- 40, 41, 42, 43, 44, 4, 28, 74, 75 = adepto de Marx kaj Lenin.
- 67, 68, 69, 70, 71, 72, 73, 35, 36 = mondlingvo.
- 46, 45, 58, 30, 29, 65, 60, 59, 38 = danciga jarparto.
- 32, 47, 16, 48, 55, 19, 33, 34, 66 = fiskaptanta birdo.
- 5, 39, 13, 52, 53, 8, 36 = sudhispana urbo.
- 3, 20, 56, 18, 22, 63, 27 = fersimila metala elemento.
- 57, 11, 62, 21, 67, 6, 23, 4, 14, 1, 35, 9 = la plej alta lernejo.
- 1—75 = kvarlinia versajeto, prezentanta la devizon de la svisa turista asocio „La Naturamikoj“.

Ĉiu solvinto ricevos tri premi-poentojn. La solvoj estos akceptataj ĝis la 15-a de majo. — Ne forgesu plenumi la konkursajn regulojn!

KONKURSAJ SOLVOJ

320-a konkurso. En ĉi tiu alloga konkurso, publikigita en la jaro 1946, partoprenis 21 personoj. Sed el ili nur 6 sukcesis doni la ĝustan solvon de la problemo: La redakcio de La Praktiko esprimis sian novjartagan bondeziron al sia ŝatata legantaro 48,620-foje, ĉar en la presita figuro tiomfoje oni povis legi, ĉiam en alia maniero, la esprimon: **NOVJARTAGAN BONDEZIRON!** La 6 laŭdindaj solvintoj estas: S-ro F. Jelenc en Tlemcen, Algerio; — S-ro H. J. A. Hartendorp en Haarlem, Nederlando; — S-ino D. C. G. Kusters-Enuma en Haarlem, Nederlando; — S-ro Eusebio Maynar en Zaragoza, Hispanujo; — S-ro Pastro Douglas W. Robson en Chesterfield, Anglujo; — S-ro Marcel Thibault en Revin, Francujo. Ĉar la solvo de la problemo estis efektive malfacila, la redakcio rekompencis ĉiun solvinton per 10 premioj. — La ceteraj 15 konkurstantoj doni la sekvantajn 15 malĝustajn respondojn: 2, 10, 18, 51, 83, 100, 164, 270, 276, 298, 5254, 20,000, 39,366, 49,220 kaj 130,562. Ĉi tiuj konkurstantoj jam ricevis sian justan rekompencan: tiomfojan novjartagan bondeziron, kionfoje ili legis la bondeziran esprimon. Sed premioj ilin ne povis ricevi.

321-a konkurso. 36 personoj klopodis diveni la kolorojn de la balvesto de niaj simpatiaj samideaninoj, kaj el ili 34 sukcesis doni la ĝustan solvon: **Julino portis violkoloran veston, Katinjo bluan, Marinjo flavan kaj Terinjo verdan.** Ĉiu solvinto ricevis unu premio-poenton. — Du konkurstantoj (s-ro A. de B. en H., Ned. kaj s-ro T. H. J. en S., Ned.) ne trafis ĝuste ĉiujn kolorojn kaj tial ili ne povis ricevi poenton.

322-a konkurso. En nia geografia ekzameno partoprenis 36 personoj. El ili 33 kun eminenta sukceso, ĉar ili ĝuste nomis ĉiujn dek insulojn, kies bildojn ni publikigis en ĉi tiu konkurso: **Honŝuo, Kubo, Majorko, Cejlono, Borneo, Cipro, Korsiko, Madagaskaro, Tasmanio, Islando.** — 3 konkurstantoj povis nomi nur 9 insulojn. La 33 eminentuloj ricevis po 3 premioj, la ceteraj 3 solvintoj po 1 poenton.

323-a konkurso. En ĉi tiu konkurso, publikigita en La Praktiko-numero de januaro 1948, partoprenis 45 personoj. La ĝusta solvo de la krucvorta enigmo estas la sekvanta:

P A S E R O A R D E Z O
P D K E I
B O N Z O V U L K A N O
T O L Z K
T E O L A V I K R O M
K L D U
B O R I O R O L U K O
T P O O
A K S O K V I N P L I
L O O K E
J A N U A R O P A S K O
R R K R T
G A R O L O G L A C I O

La supran ĝustan solvon ensendis 15 personoj. Ili ricevis po du premio-pojntojn. — 8 personoj ensendis solvon ne tute la saman kiel la supra, ĉar ili aŭ donis iun alian, sed tamen akcepteblan vorton (ekz-e *fosi* aŭ *rodi* anstataŭ *bori*, *vanelo* anstataŭ *pasero*), aŭ faris negravajn eraretojn. Ankaŭ ĉi tiuj solvoj estis akceptataj, sed la ensendintoj ricevis nur po unu poenton. — Fine 22 personoj donis solvojn kun mankoj aŭ netaŭgaj vortoj, kaj tial ili ne povis ricevi poenton.

PREMIADO Pro la ricevitaj premioj en la konkursoj 303-323 po 2 premioj ilin ricevis: S-ro R. Iserebant en Brugge, Belgujo; — S-ino D. C. G. Kusters-Enuma en Haarlem, Nederlando; — S-ro D. W. Robson en Chesterfield, Anglujo; — S-ro M. Thibault en Revin, Francujo; — F-ino S. M. Wijers en Hago, Nederlando. — Po 1 premioj ilin ricevis: S-ro A. Albault en Reims, Francujo; — S-ro A. W. de Boer en Hago, Nederlando; — F-ino M. Boer en Hago, Nederlando; — S-ino E. Burgler-Jezsó en Geleen, Nederlando; — S-ro G. C. van Diest en Hago, Nederlando; — S-ro J. P. Driesen en Batavia, Indonezio; — F-ino I. M. Enuma en Wageningen, Nederlando; — F-ino N. Hanson en Halifax, Anglujo; — F-ino J. K. v. d. Helm en Alphen a/d Rijn, Nederlando; — S-ro F. Jelenc en Tlemcen, Algerio; — S-ro E. Maynar en Zaragoza, Hispanujo; — S-ino H. Mulder-Gordt en Geleen, Nederlando; — S-ro B. S. Ohana en Marrakech, Maroko; — S-ro Ir. B. B. de Regt en Rotterdam, Nederlando; — S-ro S. Roelofsen en Voorburg, Nederlando; — S-ro Drs F. Roose en Brugge, Belgujo; — S-ro H. A. Rosbach en Røros, Norvegujo; — S-ro B. S. Trier en Haslev, Danujo; — S-ro H. Valckenier en Hago, Nederlando; — S-ro R. Volpelière en Nimes, Francujo; — S-ro L. Weijts en Apeldoorn, Nederlando. — La kuponojn ili trovas (espereble) en ĉi tiu numero de La Praktiko.



„Vizitu Antwerpen, mondhavenon kaj turisman centron.” — La nomon de la urbo ni devas per esperantigo submeti al la ortografiaj kaj gramatikaj leĝoj de nia lingvo, kaj sekve diri: „Vizitu Antverpenon, la mondhavenon kaj turisman centron”. Sed se oni volas la urbonomen teni en la nacilingva formo kaj uzi ĝin en la Esperanto-lingva parolo nur kiel fremdan vorton, tiam la frazo devas formiĝi jene: „Vizitu la mondhavenon kaj turisman centron Antwerpen.”

„La du malamikoj staris apud unu la alia.” — La ordo de la vortoj estas malbona, Oni devas diri: La malamikoj staris unu apud la alia (unu malamiko apud la alia malamiko).

„La kongresa komitato decidis doni 100 kronojn kiel premio al la aŭtoro de la plej bona artikolo.” — En ĉi tiu frazo la vorto „premio” ne estas en ordo. Ni devas diri: „kiel premion”, ĉar la transitiva verbo „doni” postulas la akuzativan finaĵon.

„Ni intencas publikigi de temp' al tempo liston da vortoj el iu fako de la ĉiutaga praktiko.” — En ĉi tiu frazo la prepozicio „da” ne taŭgas, ĉar oni ja ne parolas pri la nombro aŭ kvanto aŭ multeco de la vortoj, sed nur pri la publikiga formo de tiuj vortoj. Tial ni devas diri: „ni publikigos listojn da vortoj” aŭ „vortlistojn”.

FILMSTRIOJ EN ESPERANTO

39 kompletaj lumbild-serioj kun tekstlibretoj en Esperanto.

Jam aperis:

N-ro	Titolo	Prezo	Steloj
1.	La antikva Grekujo	28.—	Steloj
2.	Inter la araboj	21.—	„
3.	Lando kaj popolo de Siam	25.—	„
4.	Javo (Indonezio), 1-a parto	25.—	„
5.	„ 2-a	27.—	„
6.	Kun Sven Hedin al la Transhimalajo	33.—	„
7.	Sovaĝaj bestoj de Afriko	28.—	„
8.	La vizaĝo de la tergloblo	30.—	„
9.	Meksikio	27.—	„
10.	Marvojaĝo al Indonezio	30.—	„
11.	La mirinda Niolando	34.—	„
12.	Borneo laŭ bildoj	33.—	„
13.	La nederlanda provinco Zelando	18.—	„
14.	Palestino (R.K.) norda duono; kie la Kristo vivis	29.—	„
15.	Palestino (R.K.) suda duono; kie la Kristo vivis	27.—	„
19.	Laponoj kaj finnoj	31.—	„
27.	Danujo	30.—	„

La indikitaj prezoj estas por filmstrio kun tekstlibro. Nura tekstlibreto kostas la duonon. — La filmstrioj havas larĝen de 35 milimetroj.

Bonvolu pagi:

en Nederlando al s-ro J. F. C. M. Dercks, Antwerpschestraat 45, Bergen-op-Zoom. (Postĝirokonto 28 65 57.)

Plue al:

U.E.A., Herongate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.
Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172. Den Haag, Nederlando.

Farante pagon ĉiam aldonu: „por la konto de s-ro J. F. C. M. Dercks”, kaj por nia kontrolo nepre sciigu nin tuj, al kiuj vi pagis la sumon. — Ĉe tiu pago per banko aldonu 4 Stelojn.

Por pagoj en la eksterlando oni direktu sin rekte al la „Esperanto Film-Grupo” (Antwerpschestraat 45, Bergen-op-Zoom, Nederlando), aŭ petu tie senpagan prospekton.

PANORAMO

La unua dresisto. — La unua homo, kiu havis la ideon dresi sovaĝajn bestojn, estis la anglo Wombwell. Li aranĝis ekspozicion de sovaĝaj bestoj en la jaro 1806. Unu negro devis zorgi pri la bestoj kaj speciale pri du leonoj, kiuj estis morte malsanaj. Kiam la anglo vidis, kiel sen-time la negro eniris en la kaĝon de la leonoj, li decidis utiligi la kuraĝon de sia servisto. Kiam la leonoj denove estis sanaj, li ŝanĝis sian taktikon kaj komencis al la publiko kiel atrakcion anoncadi la negron, kiu sen timo manipulas la leonojn en la kaĝo. Tiamaniere s-ro Wombwell rapide riĉiĝis sen iu danĝero por si mem, dum la meritplena negro restis malriĉa, kaj la ne malpli meritplenaj leonoj same.

Baroj falas... — La malgranda Svislando forte batalas por la restarigo de la normala internacia vivo. En la kunvenoj de la potencaj „Alliance Internationale de Tourisme”, „Internacia Komerca Ĉambro” kaj „Fédération Internationale de l'Automobile” la svisaj delegitoj daŭre prezentas kaj subtenas proponojn por la forigo almenaŭ de la pasportaj vizoj. Ankaŭ la delegitoj de kelkaj aliaj ŝtatoj aliĝis al la svisa opinio, ke nun, post la milito, tiuj baroj devas fali; la dum-militaj komplikacioj ne estas plu necesaj, kaj ili forte malhelpas la internacian vivon tiel dezirindan inter la popoloj. Svislando modele kaj praktike antaŭenpuŝis la aferon kaj forigis la pasport-vizojn por ŝtatanoj de la sekvantaj landoj: Argentino, Aŭstralio, Belgujo, Brazilo, Britujo, Danujo, Irlando,

Italujo, Kanado, Kolumbio, Kubo, Luksemburgo, Nederlando, Norvegujo, Novze-lando, Peruo, Sudafriko, Svedujo, Urugvajo, Usono kaj Venezuelo, parte ankaŭ de Francujo. La saman aranĝon aprobis la princlando Liechtenstein, kiu ja estas en ekonomia unio kun Svislando.

Kristnask-avo per paraŝuto. — Dum la milito la brita aer-armeo aranĝis en Kapurbo grandan kristnask-feston por la infanoj. La ĉefa punkto de la programo estis la alveno de la kristnask-avo — el la ĉielo per paraŝuto! En la fiksita tempo multegaj infanoj rigardadis al la ĉielo, kaj ne vane, ĉar en unu momento laŭplane aperis la bona maljunulo, elsaltinta el unu militflugmaŝino, kun sia sakego plena de donacoj. Sed tio jam ne estis laŭplana, ke anstataŭ fali sur la flugkampon, pro la vento li falis precize en la mezon de la pikildrata zono ĉirkaŭanta la flugkampon. La infanaro ĝuegis la scenon, en la opinio, ke la alteriĝa loko estis intence elektita. Sed la malbonŝanca paraŝutisto devis pagi sian salton per plurmonata restado en malsanulejo.

Interesa milito. — La hindaj ŝtatoj Khar kaj Navaga jam de multaj jaroj militadas unu kontraŭ la alia. La batalantaj partioj posedas nur unu kanonon, kiu apartenas al tria malgranda ŝtato, nomata Halizai. Ĉi tiu ŝtato ĉiujare ludonas sian kanonon al tiu, kiu plej multe pagas, kaj tiel ĉi tiu jam tre malnoviĝinta batalilo funkcias jen en la unua, jen en la alia ŝtato. Sed ĉi tiu milito havas ankoraŭ

alian strangan econ: oni militas nur laŭ interkonsento. Kiam la rikolto estas matura, oni aranĝas armisticon, kiu daŭras ĝis la fino de la kampara laboro. Post tio la popoloj de Khar kaj Navaga denove preparas sin al la milito. En modela konkordo ili komune fiksas la tagon de la rekomenco, kaj poste ĉiu siaflanke klopodas venki la alian.

La superstiĉo ne elmortis. — Dum la mezepoko la superstiĉo floris en ĉiu lando de Eŭropo. La homoj serioze kredis en sorĉistinoj kaj en ĉiaj formoj de nigra magio. Sed la mondo ĝis hodiaŭ ne multe ŝanĝiĝis. Al ĉi tiu konkludo venis iu sinjorino, kiu vizitis 52 landojn por fari esplorojn pri la superstiĉoj vivantaj en tiuj landoj. Ŝi ĵus verkis enciklopedion, en kiu ŝi priskribas pli ol 100.000 formojn de nuntempa superstiĉo. Plej malbona estas la stato en la plej moderna lando de la mondo, la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko. En Usono ekzistas nun pli ol 10.000 formoj de superstiĉo, en kiuj precipe la loĝantoj de la kamparo ankoraŭ firme kredas.

Rapidecoj. — Iu naturscienca esploristo metis limakon en rad-muelilon kaj marŝiĝis ĝin dum unu tago. Li konstatis, ke la besteto iris kun rapideco de 0.000564075 kilometroj hore. La fulmo estas iom pli rapida, ĉar ĝi trairas la spacon kun rapideco de 213.318.800 kilometroj en unu horo.

La barbira babilemo. — Oni ne scias, kial la frizistoj kaj barbiroj estas konataj kiel babilemuloj, sed estas konata fakto, ke multaj homoj ŝatas liberigi sian koron dum oni tondas iliajn harojn aŭ razas ilian barbon. La plej multaj viroj ne ŝatas aŭdi ĉiufoje, ke la vetero estas bela, ke ĉio fariĝas pli multekosta aŭ ke la registaro falis, ĉar tion jam ĉiu sciis antaŭe. Oni devas admiri tiun barbiron en la usona urbo Pasadena, kiu en sia salono pendigis tabuleton kun la vortoj: „Ni senpage tondas viajn harojn, se ni parolas unue”.

La pafilo de Robinsono Kruso. — Antaŭ nelonge unu pafilo estis vendata en Anglujo, el la kolekto de sinjorino Randolph Berens. Tiu armilo havis valoron ne nur pro tio, ke ĝi estis malnova, sed precipe ĉar sur ĝia kolbo estas engravurita la vortoj: „Alexander Selkirk de Larga, 1701”. Ĉi tiu Alexander Selkirk estis la viro, kiu inspiris la anglan verkiston Daniel Defoe, skribi la faman verkon „Robinson Crusoe”. La pafilo estis vendata por 250 pundoj.

LA LIBRO, KIUN ĈIU ESPERANTISTO

DEVAS POSEDI:

ORIGINALA VERKARO

de D-ro L. L. ZAMENHOF

Antaŭparoloj. Gazetartikoloj. Traktaĵoj.
Paroladoj. Leteroj. Poemoj.

Kolektis kaj ordigis Prof. D-ro Joh. Dietterle.


Formato 15 × 23 cm. Kun 6 faksimilaĵoj kaj portreto de D-ro Zamenhof. En luksa tolbindaĵo kun surpriso en du koloroj kaj oro.

Prezo 45.— Steloj.

Afrankita sendo.

Al Aktivaj Membroj de UIL rabato de 10%
ĉe antaŭpago.

Internacia Esperanto-Instituto
Den Haag, Nederlando.



NOVAJ LIBROJ

La recenzitaj libroj kaj ĉiuj aliaj esp-aj libroj estas aĉeteblaj ĉe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago.

JARLIBRO 1948 DE UEA. — Formato 11 × 15 cm. Unua parto 248 paĝoj, dua parto 48 paĝoj. — La bone konata Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio por ĉi tiu jaro aperis, kiel en la lastaj jaroj, denove en du partoj. La unua parto, publikigita en la printempo, entenas la kutimajn informojn pri la Asocio kun la adresaro de la Delegitoj kaj plue utilajn listojn de la esperantistaj landaj asocioj, gazetaraj esperantista, eldonejoj esperantistaj, fakaj organizaĵoj, universalsaj Esperanto-kongresoj kaj la adresaron de la anoj de la Lingva Komitato kaj Akademio. — La dua parto, publikigita en la aŭtuno, enhavas la aldonojn kaj ŝanĝojn en la adresaro de la Delegitoj, la statuton kaj regularon de UEA, kaj la tabelon de la kotizoj por 1949. — La Jarlibro ne estas vendata. Oni povas akiri ĝin nur per aliĝo al UEA kiel individua membro. Informojn pri la aliĝo oni povas ricevi de la lokaj Delegitoj, landaj Ĉefdelegitoj kaj de la Centra Oficejo de UEA: Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

LA JUNIA VIVO. Internacia kantaro. 48 paĝoj. Formato 16 × 12 cm. Prezo — 75 ned. guld. Eldonis J. Muusses en Purmerend, Nederlando. — La libreto entenas la tekstojn kaj kantnotojn de tridek bone elektitaj kantoj, precipe por la gejunularo. Ĝi estas bonvena helpilo por klubkunveno, kurslecionoj, ekskursoj k.t.p.

Karl Lindqvist: FERIO KUN LA MORTO. Kriminalromano verkita originale en Esperanto. 72 paĝoj. Formato 15 × 22 cm. Kun kovrilo en kolora preso, deseguita de Elna Lindqvist. Prezo 3,50 danaj kronoj. Eldonis: Dana Esperanto-Eldonejo, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danujo. — Tante verkita rakonto en bona stilo. La aŭtoro estas esperantisto de 1936, pastro en la dana urbo Saksøbing. En la jaro 1938 li partoprenis karavanvojaĝon al la Esperanto-Domo en Arnhem (Nederlando) kaj poste verkis pri tiu vojaĝo danlingvan libron por geknaboj sub titolo „Kun Dølle al Nederlando“. En la libro li faris multajn menciojn pri la utileco de Esperanto kaj per tio li instigis tre multajn gejunulojn en Danujo al la lernado de nia lingvo. S-ro Lindqvist estas jam konata kaj ŝatata verkisto en dana lingvo. Ni esperas, ke la sukceso de ĉi tiu plaĉa rakonto, kiun ankaŭ komencantaj esperantistoj facile povas legi pro la simpleco de la lingvo, decidigos lin verki pluajn originalaĵojn en la mondlingvo. — Laŭdante la lingvon de ĉi tiu libro ni devas kun bedaŭro konstati la sisteman forlason de la akuzativa finaĵo ĉe la propraj nomoj. Ĝi estas grava malobeo al la gramatika regularo de nia lingvo kaj ĝi estas konstatebla, kiel moda fenomeno, ankaŭ en aliaj libroj. Niaj verkistoj, tradukistoj kaj kontrolistoj konsciiĝu pri tio, ke la akuzativa finaĵo, same kiel la prepozicioj, devas esti aplikata ankaŭ al la propraj nomoj, eĉ kiam ĉi tiuj ne estas esperantigitaj.

J. C. Heer: ĈE LA SANKTAJ AKVOJ. Romano el la svislanda montegaro. Dua parto. El la germana lingvo tradukis A. Bader, P. le Brun kaj J. Schmid. 136 paĝoj. Formato 16 × 23 cm. Eldonis Svisa Esperanto-Societo, Bern. Prezo, kune kun la unua parto, broŝurita en du volumoj 6.10 sv. frankoj, bindita en unu volumo 7.10 sv. frankoj, plus sendkosto. Adreso por la mendoj: Libroservo de S.E.S., s-ro Otto Walder, Eigenheim, Romanshorn, Svislando. — Post la publikigo de nia recenzo pri la unua parto (ĉapitroj I-VIII) sur paĝo 41 de La Praktiko en la n-ro de febr.-marto 1948, kun ĝojo ni salutas la aperon de ĉi tiu dua parto, kiu entenas la ĉapitrojn IX-XXII de la interesa kaj instrua rakonto pri la malfacila vivo de la svisaj altmontaranoj. La eldono de ampleksa verko, kiel ĉi tiu, estas riska entrepreno, kaj tial ni deziras, ke la atendoj de la eldonintoj pri la disvastiĝo de ĉi tiu rimarkinda eldonaĵo realiĝu.

RADIO

PROGRAMO

DE ESPERANTO-LINGVAJ ELSENDOJ

La horoj estas indikitaj en la mezeŭropa tempo, kiu dum la vintro 1948/49 estas uzata en la plej multaj landoj de Eŭropo (Aŭstrio, Belgujo, Ĉeĥoslovakio, Danujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Nederlando, Norvegujo, Svedujo, Svislando k.a.). — Britujo, Irlando kaj Portugalujo deprenu unu horon. — Orientuŭropo, Grekujo, Egiptujo kaj Turkujo aldonu unu horon. — La grinvicia tempo egalas kun la brituja tempo.

REGULAJ ELSENDOJ

Ĉiutage:

16,30—16,45 *Praha* 31.41 m. kaj 1935 m. — Informoj.
18,15—18,30 *Paris* 41.21 m. — Varia programo.
22,00—22,15 *Praha* 49.92 m. — Parolado.

Lunde:

08,15—08,30 *Stockholm* 31.46 kaj 49.46 m. — Parolado, informoj.
12,30—12,40 *Brazilo PRG* 2. 104 m. — Parolado.
16,15—16,30 *Stockholm* 19.80 kaj 27.83 m. — Parolado, informoj.
22,50—23,00 *Praha* 470 m. — Varia programo.
23,00—23,30 *Ĉeĥoslovaka Verda Stacio* 269 kaj 325 m. — Arta programo. (Nur en la unua lundo de la monato.)
24,30—24,35 *Budapest I* 550 m. Informoj.

Mardo:

02,15—02,30 *Stockholm* 31.46 kaj 49.46 m. — Parolado, informoj.
15,15—15,30 *München* 48.70 kaj 405 m., *Nürnberg* 316 m. — Kurso. (En ĉiu dua mardo.)
18,55—19,00 *Bern* 25.61 kaj 48.66 m. — Paroladoj de D-ro A. Baur.
19,50—20,00 *Sofia* 32.09 m. — Paroladoj.
21,45—22,00 *Hradec Králové* 238 m. — (Ne en la unua mardo de la monato.)
22,00—22,10 *Ostrava* 259 m. — (Ne en la unua mardo de la monato.)

Merkredo:

06,45—07,00 *München* 48.70 kaj 405 m., *Nürnberg* 316 m. — Kurso. (En ĉiu dua merkredo.)
11,15—11,35 *Paris* 432 m. — Kurso.
22,10—22,25 *Warszawa III* 48.25 m. — Informoj.
24,30—24,35 *Budapest I* 550 m. — Informoj.

Ĵaŭde:

18,45—19,00 *Hradec Králové* 280 m.
18,45—19,00 *Wien II* 31.05, 41.81 kaj 229 m. — Kurso kaj informoj.
18,55—19,00 *Bern* 25.61 kaj 48.66 m. — Parolado de D-ro Edmond Privat pri mondfederacio kaj mondpaco.
22,00—22,10 *Ostrava* 259 m.
22,50—23,00 *Praha* 470 m. — Varia programo.

Vendredo:

19,50—20,00 *Sofia* 32.09 m. — Paroladoj.
24,30—24,35 *Budapest I* 550 m. — Informoj.

La redakcio de La Praktiko danke ricevos kompletigajn informojn.

Esperantista memor-libreto

por kolekti subskribojn kaj adresojn. Tre utila en kongresoj, kunvenoj, kursoj k.t.p.

Prezo: — 60 St.

Aĉetebla ĉe la Intern. Esp.-Inst. en Hago.

ANONCETOJ

TARIFO:
1 vorto aŭ mallongigo 0.20 St.

MONTRU nian adreson al personoj, kiuj deziras partopreni en **Skriba Esperanta A-kurso**. (Nur por nederland-lingvanoj.) Petu prospekton! — Esperanto-School, Abelenstraat 54, Hengelo (Ov.).

ARTSKULPTISTINO: Johanna Sprenkels, Molenlaan 149, Rotterdam (Nederlando), deziras korespondi pri tiu arto kun alilandaj gesamartistoj.

PETO. — Por la Esperanto-kurso de knaboj en la punlernejo mi danke ricevus uzitajn lernolibrojn, legolibrojn, gazetojn k.t.p. — S-ro J. van Wageningen, Utrechtsche weg 232, Amersfoort (Nederlando).

MI PETAS ĉiulandajn gesamideanojn sendi al mi la katalogojn de firmoj produktantaj ladovarojn kaj infanludilojn. Min interesas ĉiuspecaj ladovaroj kaj infanludiloj faritaj el diversspecaj materialoj kaj precipe el lado. Ĉiun sendaĵon mi rekomencos per poŝtmarkoj aŭ per io alia laŭ deziro. Mi ne estas filatelisto kaj pro tio mi povas sendi nur cirkulantajn poŝtmarkojn neuzitajn aŭ uzitajn. Adreso: S-ro Mehmed Jakupoviĉ, Ivičeva 2, Zemun (Jugoslavio).

LETERVESPERON por la kursanoj (komencantoj) aranĝas la Asocio de Laboristaj Esp-istoj F.L.E. (Fidu La Estontecon) je la fino de februaro 1949. Bonvolu sendi esperantaĵojn, kartojn, leterojn. Adreso: F.L.E., Weimansweg 50, Rotterdam-Z. (Nederlando).

HELPU la portugaliajn esperantistojn! — La portugala Esperanto-movado renaskiĝas nun sub la malsimpatia rigardo de la tiea registaro. Tial ĝi bezonas la helpon de ĉiuj esperantistoj. Helpu nin sendante unu Esperanto-libron por nia „Cirkulanta Biblioteko“. La sendaĵojn adresu al: Portugala Esperanto-Ligo, Apartado 125, Lisboa-N., Portugalujo.

ANTAL KERTÉSZ

FABRIKISTO DE LIKVIROJ KAJ BRANDOJ, GRANDKOMERCISTO DE MONDFAMAJ HUNGARAJ VINOJ KAJ DE FRUKTOSIROPOJ.

Aktiva Membro de U.L.

Korespondas en Esperanto.

Debreceni u. 2,
NYIREGYHÁZA (Hungarujo).

Ĝardenposedantoj!

Por aranĝo kaj prizorgado de ĝardenoj, liverado de flor-bulboj, -plantoj kaj -semoj, bukedoj kaj ĉiuspecaj floroj, turnu vin al:

H. DE WATER

AM de U.L., ĝardenisto de la Nederl. P.T.T.

Scheveningen ĉe Hago

Vijzelstraat 203. — Tel. Hago 550875.

Rabato de 10% al ĉiuj membroj de U.L. — 2% de ĉiu fakturumo donacotaj al U.L. en la formo de brikoj. — Liverado ankaŭ al eksterlando. — Oni povas pagi per premio-kuponoj de U.L. aŭ pere de la landaj reprezentantoj de U.L. — Petu preziston!



K O R E S P O N D U

Klarigoj en la januara numerol

ARGENTINO

Tartagal (Salta). — S-ro D-ro J. MIGUEL REYES, Manuela Pedraza, FCCNA. — Interŝ. PM k.ĉ.l., 25—50 pecojn malsamajn, ne komunajn. Respondo garantiata nur je registritaj leteroj.

DANUJO

Aarhus. — S-ro M. KRISTENSEN (51-jara fervojisto, UL 4348), Fynsgadr 4. II. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Linde pr. Spentrup. — S-ro V. JOHANSEN (30-jara terkulturisto kun multaj interesoj, precipe pri socialaj problemoj). — Dez. kor. k.ĉ.l.

FINNLANDO

Punkalaidun. — S-ro Aappo KURIKKA. — Sciigas al siaj geamikoj ŝanĝon de adreso (antaŭe en Kalmari). Ĉiam interŝ. PM, Pl, il. gaz. k.a. k.ĉ.l. Skribu, sendu, afranku filatele!

FRANCUJO

Montluçon (Allier). — S-ro Marien MEYNOT (UL 2900), 9 rue Notre-Dame. — Serĉas gekoresp. por pli ol 50 novaj kaj malnovaj geesp-istoj ĉiujagaj. L. Pl, k.ĉ.l. (precipe transoceaniaj). p.ĉ.t. Certe resp. (eĉ al tre maljunaj). Skribu legeble vian adreson, indiku aĝon kaj profesion.


Nantes. — S-ro R. OLIVAUX, 17 rue Contrescarpe. — Dez. kor. kun iluziistoj kaj prestiĝigitatoroj, k.ĉ.l.

Thiers (Puy-de-Dôme). — S-ino Zoë BERTHET, 28 rue Docteur Joubert. — Dez. kor. kun ĉiulandaj Bahaanoj en la lingvoj Esp., franca kaj angla.

GERMANUJO

Auerbach Vogtl. (Sovjeta zono). — S-ro Paul THOMAS (44-jara, esp-isto de 1924, naturamanto), Fr.-Ebert-Str. 26 A. — Serĉas seriozan amikrilaton kun ĉiulandaj esp-istoj, kiuj amas la naturon (birdojn), literaturon kaj homaranismon. Nepre respondos. Afranku filatele!

TAGE kaj NOKTE Preta



La moderna homo scias tiri plenan profiton el la servoj, kiujn la K.L.M. (Nederlanda Reĝa Aervetura Kompanio) proponas, por sia persona kontakto kun ĉiulandaj amikoj, en sia profesia aktiveco kaj en la transporto de varoj kaj poŝtajtoj.

Kompletajn informojn
volonte donas:

K.L.M.

LA K. L. M. - A G E N T E J O J K A J - O F I C E J O J

(22a) Geldern (Rheinland). — S-ro Max MOLLENHAUER, Postfako 4. — Dez. kor. k.ĉ.l. per Pl kaj L. Certe respondos.

HISPANUJO

Barcelona. — S-ro L. BARCELO, Bou de San Pedro 8-4-3. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Zaragoza. — S-ro Fernando de DIEGO (29-jara tradukisto, AM de UL 5830), strato Baltasar Gracián 12-3. — Dez. kor. k.ĉ.l. kaj interŝ. PM kaj PK. Respondo garantiata. La anonco validas ĉiam.

HUNGARUJO

Alag. — S-ro D-ro János ESCH (kuracisto, UL 5816). — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. kaj interŝ. Pl.

Budapest III. — S-ro D-ro Vince TÓTH, Jolsva u. 4. — Interŝ. aŭ aĉetas maksimumkartojn, amaspoŝtmarkojn (min. 300 pecojn), ĉiuspacajn Esperanto-filatelijaĵojn: esp-ajn PM, stampojn, glumarkojn k.t.p.

Győr III. — S-ro Miklós PÉRCSY (22-jara teĥnika oficisto, fraŭlo), Vörös Hadsereg útja 98. — Dez. kor. k.ĉ.l. per Pl kaj L. Nepre respondo!

Pestszentlőrinc. — S-ro Johano WINDISCH (43-jara, oficisto), Ond-u. 21. — Dez. interŝ. PM po pecoj k.ĉ.l.; kor. per Pl bildflanke afrankitaj k.ĉ.l.; interŝ. spritaĵojn kaj anekdotojn porsalonajn kaj aliajn k.ĉ.l.

ITALUJO

Milano. — S-ro D-ro Mario DA CONCA (kemiisto kaj farmakologo, 47-jara), Viale Monza 191. — Dez. kor. k.ĉ.l. kaj interŝ. PM, Pl kaj presajtoj pri turismo, folk'oro, framasonaro, esoterismo, religioj, federalismo, homaranismo, filatelio, en la lingvoj Esp., franca kaj angla.

NEDERLANDO

Alkmaar. — F-ino Jannie MOL (muzikinstruistino, UL 3637), Kennemerstraatweg 199. — Dez. kor. pri muziko, literaturo, arto, fotografado k.t.p., ankaŭ kun blinduloj per brajla skribo. Interŝ. Pl kaj PM.

Amersfoort. — S-ro J. van WAGENINGEN (UL 4522, knabestro en punlernejo), Utrechtse weg 232. — Dez. kor. k.ĉ.l. pri redukado de necesaj knaboj al bonaj socialaj homoj.

Amsterdam-Z. — S-ro J. SUK (47-jara komerca korespondisto), Hunzestraat 55. II. — Dez. kor. kun lerta esp-isto, ne filatelisto aŭ simila.

Hoogwoud (N.H.). — S-ro P. BAKKER, Langereis A 31. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Nepre respondos.

Krommenie. — S-ro A. MANTJES, Eikelaan 17. — Serĉas kontakton kun franca samideano el Dax kaj Pau.

PORTUGALUJO

Lisboa. — S-ro Faustino LEITAO, Rua da Costa 43-2. — Interŝ. PM k.ĉ.l., eĉ kun progresintoj. Respondo garantiata. Ne sendas unue.

Portimao. — S-ro António C. MARREIROS, Rua Sampaio Bruno 83. — Dez. kor. per L kaj Pl k.ĉ.l., p.ĉ.t. Nepre respondos.

Novajol

Jus aperis!

DE WEGWIJZER

naar internationaal begripen door correspondentie in de internationale taal Esperanto.

Nederlandlingva propaganda lernolibreto laŭ la finlingva originalo verkita de Vilho Setälä, membro de la Akademio de Esperanto.

La 24-paĝa broŝuro entenas rapidkurseton de Esperanto, lernmodelojn kaj la 500 plej ofte uzatajn radikvortojn, elektitajn sur scienca bazo laŭ la statistiko de vortofteco.

La materialo de ĉi tiu libreto estas sufiĉa por komenci internacian korespondadon kaj por legi la libreton „MARY KAJ SULO” (rakonteto pri la amikiĝo de angla knabino kaj finna knabo en la formo de iliaj leteroj).

Prezoj: DE WEGWIJZER — 80 Stel.
MARY KAJ SULO — 80 „

Al revendistoj la kutima rabato. — Al Aktivaj Membroj de UL rabato de 10 % ĉe antaŭpago. — Afrankita sendo.

Eldonis:

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO
Riouwstraat 172, Den Haag. — Poŝtkonto 162626.

(Oni povas pagi ankaŭ per nederlandaj poŝtmarkoj en leteroj.)